

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo  
Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

**ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**

Neŭtrale kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), EPA (Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto), UTSLE (Universala Tao-Stud-Ligo Esperantista), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantistaj Judoj), U. E. A., ŬEA (Ŭon-budhisma Esperantista Asocio). Membro de WCRP (*World Conference on Religion and Peace* / Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), asociita al IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco). Subtenas la Iniciaton por **Unuiĝinta Religiaro** (*United Religions Initiative*), **fondita en junio 2000.**

Eble la lasta numero de *Asistilo* ?  
(vidu la "Averton de la redaktoro" ĉi-dorsflanke)



**MORTOPUNO  
NENIAM ! NENIE !!**

## Averto de la redaktoro

Mi bedaŭras anonci al la legantoj ke eble tiu ĉi revuo ne plu aperos : la redaktoro eble fariĝos redaktoro de alia E-revuo, kaj tiel eble ne plu havos sufiĉe da tempo por tiu ĉi.

La fideluloj bonvolu do NE sendi abonon por la jaro 2001 (sed la forgesemuloj tamen rajtas sendi "ŝulditan" monon pro la senpage ricevitaj numeroj ĉar mi "pruntedone" donacis ĉ. 10.000 gld., en 12 jaroj) ...ĝis kiam ili eble ricevos eventualan venontan numeron ?

Mi proponas rendevuon ĉe la *Universala Kongreso en Zagrebo*, kie ni diskutu por eble trovi solvon pri plua aperado.

Ĉiukaze mi sendas al ĉiu el vi mian dankon kaj elkorajn bondezirojn por la nova jarmilo.

**N.B.** Bonvolu tamen sendi viajn artikolojn ktp., en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj : *Word Perfect...*) sur disketoj (3 ½), plie de la surpapera kutima formo : tiel mi ŝparas la enkomputiligan retajpadon ; aŭ fakse ; aŭ rete : [chlavarenne@francemultimedia.fr](mailto:chlavarenne@francemultimedia.fr).

Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spiritaj kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata

Red.: Presbytere F-09800 Balagué. Tel/Faks 33 561 047 066

ASISTI-estraro : Prez. Y. Umeda – B. Moro : kasisto (Skrytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle, Pollando) – Ch. Lavarenne : sekretario kaj vickas. – G. Berveling : eksteraj rilatoj – L. Nordenstorm : Religia Antologio.

Directeur de Publication : Christian Lavarenne

Jarabono : triono de UEA-individa abono (MA), t.e. 105ff / 35gld / 30DM / 20\$ (duone por malriĉaj landoj) al :

– CCP *Asistilo*, 1042177R Marseille (nur en frankoj !)

– UEA-konto *asis-r*

– FEL-konto *clvr-n*

– B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

Subtena abono : ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 eŭroj

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

ASISTI-kotizo 2001 : deviga por esti membro, kiom ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ : 7 eŭroj, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

Subtena membro : ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40 eŭr.

**...Ne forgesu kontribui, koran dankon !**

## Enhavo

La Ora Regulo, kompilita de Aura-Europa, interreligia centro (B)	3
Avinjo Testudo, de Douglas Wood, trad. de Majk Sadler (GB/H)	4
Por necesa refratiĝo, de Asocio por kulturo, tolero, solidareco (F)	5
Ora medalo por Jacques Tuinder (NL/BG)	5
100-jara IARF ekkonscias pri la lingva problemo (GB)	5
Interreligia renkontiĝo ĉe la UNESKO-sidejo en Parizo (F)	5
Homrajtoj : – Afganinoj persekutataj, kun peticio (Afganio)	6
– Ĉu daŭre vivas la Panĉhen-Lamao ? (Tibeto)	6
– Toleru mederso (Pakistano)	6
Mortpunoj : Tibeto, Pakistano, Indiana Esperantisto (USA)	7
Pledo por respekto al la Indianoj : Deklaro de la Plej Longa Marŝado (USA)	8
La gabonaj ritarioj de la <i>iboga</i> : la <i>Buiti</i> de la Mitsoghoj, de R. Goutarel, trad. E. Coffinet (F)	9
Interreligia dialogo en Uzbekio, de J. P. Guetny (F/Uzbekio)	11
La <i>Serio pri Gilgameŝ</i> : Funebro pri Enkidu (Okta Tabuleto) (Nineva)	12
Pri Jesuo kaj Tibeto, de Ch. Lavarenne kaj Ronald C. Peries (Sri Lanko)	14
Unuaj katolikaj misiistoj en Tibeto	15
La <i>Serĉado de l' Sankta Gralo</i> : Vizia sonĝo de Lancelot... (el la romanika, 13-a jc.)	16
Kristnaska kaj novjar[mil]a mesaĝo, de Tutmonda interfratiĝo de la religioj (Bharato)	19
"Probabla" naskiĝ-jaro de Jesuo, de Monsinjoro Gall Laigle (F)	20
Kontraŭ la herezoj, II,22,4-6, de Ireneo (2-a jc., Gallio)	21
Jogosutro de Patanĝali : la Plenumado, kun komentario de Vjaso (Bharato)	22
Granda Unueca Kredo, II,1 : <i>Vivo</i> , de Jebumo (Ĉinio)	24
Kiel superi la skandalojn elirantajn el la Biblio ? , de Armando Zecchin (I)	25
Leteroj : U. Mrakpor kaj Pastoro O. G. Oshó-Dauiés (Niĝerio), K. Kraft (CZ), E. Walker (GB),	26
A. Zecchin k. L. Mantaut (I), P. Desailly (Aŭstr.), K. Deguchi (J), H.M. Otto (Alb.), L. Ramalho (BR)	27
Ni ricevis : religiaj kaj spiritaj libroj kaj broŝuroj, kiuj serĉas recenzontojn !	28



## La Ora Regulo

### Matena aspiro

Sinjoro,

en la silento de tiu ĉi naskiĝanta tago,  
ĉe la komenco de tiu ĉi nova jarmilo,  
mi petas de Ci pacon, saĝon, forton.

Mi volas hodiaŭ rigardi la mondon  
per okuloj tute plenaj de amo ;  
esti pacienca, komprenema, dolĉa kaj saĝa ;  
vidi Ciajn infanojn kiel Ci mem vidas ilin,  
trans la ŝajno,  
kaj tiel vidi nur la bonon en ĉiu.

Vestu min per Cia belo, Sinjoro :  
laŭlonge de ĉi tiu tago, ĉi jarmilo,  
mi Cin rivelu.

Tradukita el *Prier* n-ro 224<sup>bis</sup>, 9-2000  
(kun redaktoraĵoj pri jarmilo).

Kompilata de *Aura-Europa*, interreligia centro de preĝo  
kaj renkontiĝo, Guldendelle 6, B-1930 Nossegem-Zaventem.

Jen la am-maksimo :  
ne fari al la aliaj  
kion vi ne volas ke ili faru al vi.

Konfuceanismo : *Familiaraj konversacioj*, XV,23

Kontraŭ tiuj kiuj estas bonaj [kontraŭ mi]  
mi estas bona ; kaj kontraŭ tiuj  
kiuj ne estas bonaj [kontraŭ mi]  
mi estas ankaŭ bona :  
tiel ĉiuj estos alkondukataj esti bonaj.

Taoismo : *Tao Te Ching*, II,49,2

Tia estas la sumo de la devo :  
ne faru al la aliaj  
tion kio nocus cin.

Hinduismo : *Mahābhārata*, V,1517

Kiel patrino senĉese amas  
sian infanon, sian unikan infanon,  
tiel ĉiu devas ami  
sammaniere ĉiujn estaĵojn.

Budhismo : *Metta-Sutta*, 149

Bona estas nur la naturo  
kiu sin retenas por ne fari al la alia  
tion kio ne estus bona por ĝi mem.

Mazdaismo : *Dadistan-I-Dinik*, XLIX,5

Kion ci rigardas kiel malamindan,  
tion ne faru al cia proksimulo :  
jen la tuta Leĝo,  
la restaĵo estas nur komentario.

Judismo : *Talmud*, XXXIa

Ĉion ajn do, kion vi deziras  
ke la homoj faru al vi,  
vi ankaŭ faru al ili ;  
ĉar tio estas la Leĝo kaj la Profetoj.

Kristanismo : *Evangelio* laŭ Mateo, VII,12

Neniu el vi estas vera kredanto,  
tiom longe kiom li ne amas por sia frato  
kion li amas por si mem.

Islamo : *Hadis* 13 (*An-Nawawî*)

## Avinjo Testudo ( *Old Turtle* )

Iam, antaŭ longa tempo...  
sed, iel, ne tiom longa tempo...  
kiam ĉiuj bestoj, kaj rokoj, kaj ventoj, kaj akvoj,  
kaj arboj, kaj birdoj, kaj fiŝoj,  
kaj ĉiuj estaĵoj de la mondo  
povis paroli... kaj kompreni unu la alian... ,  
komenciĝis ...*disputo*.

Unue ĝi estis milda... ,  
kvieta kiel la unua bloveto kiu flustris :  
– "Li estas vento kiu neniam haltas" ;  
kvieta kiel la ŝtono kiu respondis :  
– "Li estas granda roko kiu neniam moviĝas" ;  
milda kiel la monto kiu sonoradis :  
– "Dio estas neĝa pinto, alte super la nuboj" ;  
kaj la fiŝo en la oceano, kiu respondis : "Dio estas  
naĝanto, en la malhela bluo de la marprofundo".  
– "Ne, diris la stelo, Dio estas luma tremadeto  
kaj brilado en la fora malproksimo".  
– "Ne, respondis la formiko, Dio ja estas sono,  
kajodoro, kaj sento, kiu estas tre tre proksima."  
– "Dio, insistis la antilopo, estas rapida kuranto,  
kiu amas libere saltadi kaj konkuri kun la vento".  
– "Ĝi estas granda arbo, murmuris la saliko,  
parto de la mondo kiu ĉiam kreskas kaj ĉiam donas"  
– "Vi malpravas, kontraŭis la insulo, Dio estas  
sola kaj aparta".  
– "Dio estas kiel la brilanta suno, alte super ĉio",  
aldonis la blua ĉielo.  
– "Ne, li estas rivero kiu fluas tra la koro de ĉio",  
tondris la akvofalo.  
– "Ŝi estas ĉasistino", muĝis la leono.  
– "Dio estas delikata", pepis la ruĝ-gorĝulo.  
– "Dio estas forta", brumis la urso.

Kaj la disputo fariĝis laŭta, pli kaj pli, ĝis...

**"ĈESU !"**

Nova voĉo ekparolis. Ĝi sonoris laŭte, kiel tondro,  
kaj ĝi flustris delikate, kiel ternoj de papilio.

La voĉo ŝajnis veni de...

ho, ŝajne venis de ...Avinjo Testudo !

Avinjo Testudo preskaŭ neniam parolis

kaj certe neniam disputis pri Dio.

Sed nun Avinjo Testudo ekparolis.

"Dio ja estas profunda, ŝi diris al la fiŝo en la maro,  
kaj multe pli alta ol alta", ŝi certigis al la montoj.

"Li estas rapida kaj libera kiel la vento,  
kaj senmova kaj solida kiel granda roko",

ŝi diris al la ventetoj kaj ŝtonoj.

"Ŝi estas la vivo de la mondo",

Testudo diris al la saliko.

"Ĉiam apude, tamen trans la plej fora tremanta lumo",

ŝi certigis al la formiko kaj la stelo.

"Dio estas delikata kaj forta ;

super ĉiuj aferoj, kaj en ĉiuj aferoj.

*Dio estas ĉio pri kio ni revas,  
kaj ĉio kion ni serĉas, diris Avinjo Testudo,  
ĉio el kio ni venas kaj ĉio kion ni povas trovi :*

**Dio ESTAS."**

Avinjo Testudo neniam antaŭe parolis tiom multe.  
Ĉiuj estaĵoj de la mondo miris, kaj fariĝis tre silentaj.  
Sed Avinjo Testudo volis diri ankoraŭ unu aferon.  
"Baldaŭ estos nova familio de estaĵoj en la mondo,  
ŝi diris, kaj ili estos strangaj kaj mirindaj.  
Ili memorigos pri ĉiuj kvalitoj de Dio.  
Ili havos multajn kolorojn kaj formojn,  
kun diversaj vizaĝoj, kaj diversaj manieroj paroli.  
Iliaj pensoj flugos al la steloj,  
sed iliaj piedoj promenos sur la tero.  
Ili posedos multajn kapablojn.  
Ili estos fortaj, sed ankaŭ karaj,  
amo-mesaĝo de Dio al la tero,  
kaj preĝo de la tero redone al Dio."

Kaj la homoj venis. Sed la homoj forgesis.  
Ili forgesis ke ili estis  
mesaĝo pri amo, kaj preĝo de la tero.  
Kaj ili komencis disputi...  
pri kiu konas Dion, kaj kiu ne ; kaj kie Dio estas,  
kaj kie ne ; kaj ĉu Dio estas, aŭ ĉu ne.  
Kaj ofte la homoj misuzis siajn fortojn,  
kaj vundis unu la alian, aŭ mortigis unu la alian.  
Kaj ili vundis la teron.  
Ĝis fine eĉ la arbaroj komencis morti...  
... kaj la riveroj, kaj la oceanoj,  
kaj la plantoj kaj la bestoj, kaj la tero mem...  
Ĉar la homoj ne povis memori  
kio ili estas, aŭ ke Dio estas.

Ĝis, unu tagon venis voĉo kiel la krakado de tondro  
sed delikata kiel ternoj de papilio :

**"Bonvolu ! ĈESU !"**

La voĉo ŝajne venis de la monto, kiu sonoradis :

"Kelkfoje mi vidas Dion naĝi  
en la malhela bluo de la marprofundo" ;

kaj de la oceano kiu suspiris :

"Li estas ofte inter neĝopintoj kiuj brilas sub la suno",  
de la ŝtono kiu diris :

"Mi kelkfoje sentas ŝian spiron kiam ŝi preterblovas";  
kaj de la venteto kiu flustris :

"Mi sentas lian ĉeeston kiam mi dancas inter la rokoj".

Kaj la stelo deklaris : "Dio estas tre proksima" ;  
kaj la insulo aldonis : "Lia amo tuŝas ĉion".

Kaj post longa, soleca kaj timiga tempo...

...la homoj aŭskultis, kaj komencis aŭdi...

kaj vidi Dion unu en la alia...

...kaj en la beleco de la tuta tero.


Kaj Avinjo Testudo ridetis.

Kaj ridetis ankaŭ Dio.

**Douglas Wood**  
(tr. Majk Sadler)

## Por necesa refratiĝo

Jenan simbolon, kuniĝantan la tri monoteismajn religiojn, s-ro Albert Pellerin kaj la *Asocio por kulturo, tolero, solidareco*, metas je la dispono de ĉiuj bonvolemaj homoj.



La simbolo kunigas la Davidan stelon, la kristanan krucon kaj la islaman lunarkon. Ĝi tamen antaŭprezentas **nenian universalan religion**, kaj estas malfermita al ĉiuj, kredantoj aŭ ne.

Ĝia kreinto esperas ke ĝi povos kontribui al **reamikiĝo** inter homoj kaj fariĝi la konkreta signo de ĉiuj manifestacioj kiuj defendas la valorojn toleremo, solidareco, kulturo kaj paco.

Por eskapi el kurado al abismo, nur restas al nia mondo la vojo de **kunlaboro**, toleremo, solidareco, lumigataj de scienco, humanismo kaj prudento.

« **Konverĝopunkto** de la hebrea, kristana kaj islama kulturoj, **sen esti alvoko al kunfando** de la monoteismaj religioj, la aserto "Dio estas unu" restas la plej bela invito rigardi en fora pasinto kaj trovi, sur la lipoj de la komuna praavo Abraham, mesaĝon de **frateco** inter homoj kaj inter iliaj kredoj.

Tiel, ĝi devas ne esti prenata kiel nura teologia principo, sed prefere kiel morala maksimumo kiu admonas nin vidi, inter tiuj kulturoj originantaj de **unu sama prapatro** kaj same agnoskantaj Libron, ne senfinajn dividojn, nesolveblajn kontraŭaĵojn, sed, ĉar la diverseco estas la riĉeco de la mondo, veran kompletigecon.

**Ĉu Dio estas mito** aŭ realaĵo? kreinto aŭ kreitaĵo de l' homo? **espero aŭ lambastono** de la homaro? Jen eternaj demandoj kiujn, de post tempo nememorebla, ĉiu prezentas al si mem laŭ propra maniero. Kaj ĉiu trovas sian respondon, proksiman aŭ ne al la dogmoj kaj skoloj...

Elmetita, ankaŭ mi, fronte al tiu ekzistada kaprompaĵo kiu senĉese remergis min en la "malbonfartecon" de homa kondiĉo, mi finfine ekkonsciis, post multaj legadoj, renkontoj kaj konfrontoj, ke **la ideo Dio estas universala koncepto esence propra al la vivo**, ke la vivo estas unika en ĉiu el ni, kaj **sekve, ke Dio estas unika**.

Laŭ historioj, vortoj, itineroj malsamaj sed finfine similaj, judoj, kristanoj kaj islamanoj **parolas pri la sama ideo kaj tamen interbatalis pro ĝi** dum jarcentoj anstataŭ alproksimiĝi unu al la aliaj.

Tial mi decidis krei simbolon por ke ĉiu estimu la aliajn, en vera kompletigecon. » **A. Pellerin**

## Ora medalo por J. Tuinder

Dum la solena malfermo de la 66-a *Internacia kongreso de blindaj esperantistoj*, en Plovdiv, la 5-8-2000, la prezidanton de *Evidente* (vidu 22 p. 9) oni vokis antaŭen por ricevi la plej altan distingilon de la bulgara blindularo, el la manoj de ĝia prezidanto Vassil Dolapĉiev.

Li laŭdis *Evidente* pro la ĝisnuna helpo al la brajlopresejo en Sofio, lernejoj por blindaj infanoj en Sofio kaj Varna, rekapabluga centro en Plovdiv, pro la sendado de ĉ. 70 televidaj lupeoj, pro brajlokomputila helpo al kvino da unuopaj blinduloj, kaj instrumenta subteno al hospitaloj...

(UEA-konto : *jajt-s* ; *abdij@abdijkaarsen.nl*)

## 100-jara IARF ekkoncias pri la lingva problemo

IARF (vd 13 p. 9, ktp.) estis fondita en 1900 sub la nomo *Internacia Konsilio de Unitarianoj kaj aliaj liberalaj religiaj pensuloj kaj agantoj*, "por malfermi komunikadon kun tiuj kiuj strebas kunigi puran religion kaj perfektan liberecon".

Kara Christian Lavarenne, 17-10-2000

Dankon pro la sintezo de respondoj pri *Strategia Planado*. Mi tre dankas al vi [ĉiuj respondintoj] pro la tempo kaj la peno kiujn vi dediĉis al tio.

Kiel nova Ĝenerala Sekretario mi devas lukti kun la lingva problemo, kaj mi estas konscia pri la **manko de objektiveco** kiun tiuj el ni kun la angla kiel denaska lingvo alportas al tiu problemo. La demando bezonas esti konsiderata de la Internacia [IARF-]Konsilio. La malfacilaĵo estas la grandega nombro da homoj kiuj investis en la angla kiel sia dua lingvo. Povas esti ili, pli ol la britoj kaj usonanoj, kiuj rezistos al la ŝanĝo.

Ni akceptas, kiel ASISTI-kontribuon [al IARF], la 1.388 F kiujn vi elspesis por la Strategia Planado kaj kalkulos ĝin kiel IARF-an enspezon kaj elspezon.

*Andrew Clark*

## Internacia renkontiĝo ĉe UNESKO-sidejo en Parizo

Ĝi okazos la 12-an kaj 13-an de februaro 2001 sub aŭspicio de WCRP. Temo : *"Novaj figuroj de la laboro de la religioj por paco"*. Celoj : analizi la nunajn kontribuojn kaj difini la novajn prioritatojn.

La 19-3-2000 prelegis en Parizo pri "UNESKO kaj interreligia dialogo" s-ro Doudou Diene, direktoro de la fako *Interkultura dialogo kaj phuraleco por kulturo de paco* ĉe UNESKO.

# Homrajtoj

## La Afaganinoj persekutataj

En ĉefartikolo de *Times*, la traktado de la virinoj en Afganio estas komparita kun la traktado de la judoj en la antaŭ-holokaŭsta Pollando.

Ekde 1996, la virinoj devas surmeti ĝispiedan vualegon, kaj estas publike batataj kaj ŝtonumataj se ili ne surhavas la konforman vestaĵon, eĉ nur se la okulreto ne kovras iliajn okulojn.

Virino estis **ĝismorte batata** de vir-amaso da islamaj fundamentistoj ĉar ŝi senintence videbligis sian brakon stirante sian aŭton. Alia estis ŝtonumata ĉar ŝi provis foriri el la lando kun viro kiu ne apartenis al ŝia familio. La virinoj ne rajtas labori nek eĉ hejm-eliri sen akompano de vira parenco.

La virinoj kiuj laboris kiel instruistoj, tradukistoj, kuracistoj, advokatoj, artistoj kaj verkistoj, estis devigataj ĉesi sian laboron kaj resendataj hejmen, tiel ke mensaj deprimoj iĝas tiom disvastiĝantaj ke tio fariĝas urĝa problemo. La reprezentantoj de internaciaj sanitaraj organizaĵoj opinias ke la virinoj kiuj ne sukcesas trovi la kuracadajn medikamentojn taŭgajn kontraŭ grava deprimo, **preferas morti ol vivi en tiaj kondiĉoj** (...)

La fenestraj vitroj de la virinejoj devas esti farbitaj tiel ke la virinoj estu neniam videblaj de ekstere. Tiuj ĉi devas uzi senbruaĵajn ŝuojn tiel ke ili estu neniam aŭdeblaj. La virinoj timas esti mortigataj pro la plej malgrava "miskonduto". Ĉar la laboro estas malpermesata al ili, senedzaj virinoj kiuj ne havas viran parencon, malsatmortas aŭ surstrate almozpetas eĉ se ili estas doktorinoj.

Estas kvazaŭ neniu kuracado disponebla por la virinoj, kaj preskaŭ ĉiuj komisiitoj de internaciaj sanitaraj organizaĵoj forlasis la landon. En unu el la malmultaj malsanulinejoj, ĵurnalisto malkovris senmovajn, preskaŭ senvivajn korpojn, kuŝitajn sur litoj envolvigitajn en siaj vualegoj, malemajn paroli, manĝi aŭ fari kion ajn, morte velkantajn. Aliaj frenezigiĝis. Oni vidis plej multajn el ili kaŭrantaj en anguloj, sinlulantaj aŭ plorantaj pro timo (...)

Ne nur la familiestro **rajtas mortigi** la virinojn de la familio, precipe sian edzinon, sed kolera vir-amaso same **rajtas ŝtonumi aŭ bati virinon**, ofte ĝismorte, **nur pro tio ke ŝi videbligis** kelkajn kvadratajn **centimetrojn da haŭto**, aŭ ofendis viron laŭ la plej sensignifa maniero (...)

La virinoj antaŭe edukistinoj aŭ kuracistinoj, aŭ kiuj tutsimple kutimis ĝui bazajn homajn liberecojn, nun estas severe subpremataj, kaj traktataj kiel subhomoj, nome de islama fundamentismo. □

**Deklaro sendota al Mary Robinson** (vidu 21 p. 7), UNa Alta Komisarino pri Hom-Rajtoj (UNCHR), [webadmin.hchr@un.org](mailto:webadmin.hchr@un.org) ; kaj al Angela Ing, UNa Speciala Konsilantino pri interseksaj demandoj kaj por la antaŭenigo de la virinoj, [daw@undp.org](mailto:daw@undp.org) :

" Per niaj subskriboj ni akordiĝas por taksu ke la nuna pritraktado de la virinoj en Afganio estas tute neakceptebla kaj meritas la subtenon kaj la agadon de la popoloj de UNO, tiel ke la nuna situacio en Afganio ne plu estu tolerata. NEAKCEPTEBLAS ke, en 2000, virinoj estas traktataj kiel subhomoj kaj posedajoj [de viroj]. Egaleco kaj digneco estas RAJTOJ (...), same en Afganio kiel aliloke. "

## Ĉu plu vivas la Panĉen-Lamao\* ?

En Pekino en septembro, eŭrop-parlamentanoj rajtis rigardi foton de knabo kiu povus esti la Panĉen Lamao rekonita, 6-jara, de la Dalai-Lamao.

Ĝis tiam oni ne ricevis kian ajn novaĵon pri tiu "**plej juna politika malliberiĝito en la mondo**" de post kiam, en 1995, li estis forrabita de la ĉinaj aŭtoritatoj kiuj anstataŭigis lin per alia "reenkarniĝo", agnoskita nur de ili mem kaj spite ĉiujn tradiciojn.

Se oni povus konfirmi ke vere temas pri la juna Gendhun Ĉhökji Njima tio estus, laŭ S<sup>ro</sup> Jean-Claude Buhner, favora signo de la ĉina registaro post kvin-jara silentado pri lia situacio, kio timigis multajn observantojn ke eble li estis tutsimple murdita. □

\* Vidu *Asistilo* 24.5 . 14,20 kaj ĉefe 17.6-7 . 18,16-17. (Prelego de J. C. Buhner, ĵurnalisto el la franca gazeto *Le Monde*, ĉe la urbodomo de St-Girons, F. 10-11-2000.)

## Tolera pakistana mederso

La *medersah* (t.e. Korana lernejo) de Fajsala-bad, en Pakistano, nome dediĉis sian novan alon al **M-ro John Joseph**. Tiu ĉi tiama katolika episkopo de la urbo **mortigis sin**, la 6-an de majo 1998, kiel lasta protesto kontraŭ la vivkondiĉoj de la pakistana kristana minoritato, kaj precipe **kontraŭ la priblasfema leĝo**\*\*.

Aktiva en la interreligia dialogo, la direktoro de la mederso, Pir Muhammad Ibrahim, cetere malfermis la studprogramon por akcepti kristanajn lernantojn apartenantajn al la malavantaĝitaj tavoloj : "*Tio estas, li dirias, la plej bona metodo por naski tolerantan socion*". □

\*\* Vidu sur la ĉi-poste apuda kolumno kaj n-ro 11 p. 7. (El *Actualité des religions* n-ro 17, junio 2000, p. 12.)



# Mortpunoj : neniam plu !

## Dekoj da ekzekutoj en Tibeto

La lastan lumbildon, la plej impresan de ŝia prelego, s-ino Claude Levenson ŝuldas al kontraŭaĵo kiu malfruigis je duontago, pro teknikaj kaŭzoj, ŝian aviadilan foriron el Lhasao.

Tiun matenon ŝi sentis regi en la tuta urbo tre aparta etoso kiun ŝi ne sukcesis analizi; poste "palpebla silento" etendiĝis ĉien kiam du nekovritaj militistaj kamionoj malrapide pasis, portante plurajn dekojn da tibetanoj kun surbrustaj afiŝoj kie videblegis dikaj ĉinaj surskriboj kiujn ŝi ne povis kompreni. Respondante ŝian demandon, tibetano kelkvorte klarigis ke temas pri mortkondamnitaj kiujn la ĉinaj aŭtoritatoj elmontrigas tra la urbo antaŭ ekzekuto.

De ĉino al kiu ŝi poste petis lian opinionon, ŝi ricevis proksime jenan respondon :

*"Temas pri separatistoj kiuj ne respektas la leĝon kaj do nur ricevas kion ili meritas."*

Cetere ŝajnis al ŝi ke estas nenia komunikado inter la du komunumoj, la ĉina kaj la tibeta, kiujn ĉio apartigas, kaj unue la lingvo, eĉ se la gejunuloj estas ĉiuj devigataj parkerigi ĉe la lernejo rudimentojn de tiu de la okupantoj : ne en la tibeta sed en la ĉina estas la instruado, terura handikapo por la tibetaj lernantoj, kiu ankoraŭ pligrandigas la socian ŝanc-malegalecon kies viktimoj ili jam estas.

Laŭ s-ino Levenson, la nunan situacion karakterizas vera *apartheid*. \* □

\*"Apartismo" en afrikanso : rasisma politika sistemo. La prelegoj de tiu agnoskita biografo de la Dalai-Lamao okazis la 10-11-2000 ĉe la urbodomo de St-Girons (F).

## "Profeto" en Pakistano

En 1997 Jusef Ali spertis revelacion laŭ kiu li estas la nova Profeto. En sia urbo Sahiŭal, en Pakistano, li kunigis ĉirkaŭ si kelkajn disĉiplojn. Tion kontraŭis la lokaj aŭtoritatoj (...) Jusef Ali estis sendata antaŭ la tribunalon en Lahoro. Laŭ la artikolo 295-C de la islama kriminala kodo, punanta la blasfemojn kontraŭ islamo kaj ties profeto, li estas ĵus kondamnita al morto. En lia lando tiu afero vekas malmultajn reagojn. Tie **neniu** defendanto de homrajtoj **starigis por defendi lin**. "*La temo estas tro danĝera*"\*, ili anonime konfidas... □

\*Hina Ĝilani, pakistana advokato kiu longe okupiĝis pri la rajtoj de la infano ĉe UNICEF kaj pri tiuj de la virino ĉe UNIFEM, estas nomumita al la nova posteno kreita de UNO por protekti la defendantojn de homrajtoj. (El *Actualité des religions* 21 kaj 20, nov. kaj okt. 2000.)

## Sekojo salvenda est !

Sekojo estas giganta ĉiamverda konifero kiu kreskas en montaro de Kalifornio. Ĝi povas atingi cent-metran altecon, kaj vivi longege : eĉ pli ol 2000 jarojn.

La nomo *sekojo* [sequoia] devenas de iama ĉefo de la Ĉerokoj, See-Quayah, kiu kreis la ĉerokajn literojn, sed kiun mortigis la blankuloj. Ĝi do estas ĉerok-devena esperanta vorto ; kaj tial Navtojhada Ideheŝdi ("N.I.") nature alprenis ĝin kiel propran nomon en Esperantio. Kiel la arbego, **Sekojo devas longe vivi en nia mondo !**

(Teksto kaj desegno reproduktitaj de Ljo sur **T-ĉemizoj** aĉeteblaj **por subteni lin** : 55 F, ĉe E-o, Lafigère, F-07140 Malarce.)



Sekojo (N. I. Sequoyah) naskiĝis, kaj ricevis la nomon Billy Waldon, la 3-1-1952 en Tahlequah (Oklahomo). Post la duagrada lernejo, li aliĝis al la usona mararmeo. Tie li trejniĝis kiel teknikisto kaj fariĝis suboficiro komisiita supervidi la elektronikan kontrolon de maraj operacioj.

Dum sia marista kariero li komencis advokati **esperanton**. Li partoprenis en multaj kongresoj, kaj multlande prelegis pri la ĉeroka lingvo, kaj la problemoj de la **rajtoj de la indianoj** en Usono.

Post servo agnoskita kiel honorinda, li proprave forlasis la armeon en 1984. Li plu aktive fordonis sin al sia pasio por la ĉeroka kaj esperanto.

En **junio 1986** Sekojo estis arestata ; kontraŭ li registriĝis ok akuzpunktoj rilataj al krimaj agoj plenumitaj en Oklahomo inter la 15-a kaj la 23-a de novembro 1985, kaj dudek pri faktoj okazintaj en San Diego inter la 7-a kaj 20-a de decembro.

Temas pri murdo, seksa atenco, krima incendio, rabo kun armilo, uzo de pafarmilo kun intenco mortigi, frapado kaj vundado, kaj enrompo.

Ĉar **eblis trovi nek motivojn** por la agoj atribuitaj al la akuzito, **nek faktajn pruvojn**, la prokurora argumentado baziĝis nur sur la malkovro de ŝtelitaĵoj en la veturilo de Sekojo kaj la dubinda atesto de homo laŭdire vidinta lin. La akuzito ne sukcesis akceptigi la **tezon de politika komploto** direktita kontraŭ usona indiana aktivulo. Sekojo estis kondamnata je morto en februaro 1992.

Kunlabore kun "fosters" kaj svisaj ĵuraj organizajoj, la angla *Jurista Komitato pri Hom-Rajtoj* pretigis apelacion kontraŭ la kondamno de Sekojo, motivitan per konstatitaj **atencoj al Hom-Rajtoj**.

(Resumita raporto por *Bar Human Right Committee*, el <http://pss100.psi.ch/~claudio/crpp/fosters/fosters.html>)

# Pledo por respekto al la Indianoj

Sekojo probable ne partoprenis en la "*Plej Longa Marŝado*" de la Indianoj (1978), kies *Deklaron* ni tradukas ĉi-malsupre, sed li certe aŭdis kaj ĝojis pri ĝi. Do jen ĝi, kiel signo de solidareco kun li.

Ni estas la suverenaj kaj liberaj infanoj de Patrino Tero. De antaŭ homa memoro nia popolo vivas sur ĉi tiu lando. Dum sennombraj generacioj **ni vivis en harmonio** kun niaj parencoj la kvarpieduloj, la flugiluloj, la naĝuloj kaj la rampuloj.

(...) La restaĵoj de niaj prapatroj kaj de niaj multaj parencoj estas pli granda parto de tiu ĉi lando ol kies ajn restaĵoj. **La montoj kaj la arboj estas parto de ni** : ni estas la karno de ilia karno (...)

Nia Patrino Tero nutras, vestas kaj ŝirmas nin, kiel ŝi faras por ĉiu vivo, sed tiuj kiuj adoptis okcidentajn valorojn **ne konscias pri la valoro de la Kreitaro. Ili ekspluatas nian Patriron Teron** kaj ĉiujn niajn parencojn kiuj vagadas kaj kreskas kun ni. Tio ne estas ĝusta (...)

Ĉiumaniere la vivoj de nia popolo estas disrompitaj (...) La plej monstra aspekto de tiu ĉi subpremado estas **fetiĉisma tendenco** de la okcidentuloj al perturbado de niaj prapatroj.

Nome de scienco kaj akademias studoj la arkeologoj kaj aliaj tomb-rabistoj travagas la kamparon avida serĉante la restaĵojn de nia popolo.

Por nia popolo la transpaso el tiu ĉi mondo al la alia estas same signifoplena kiel naskiĝo. **Kiam nia spirito komencas sian vojaĝon al la mondo de la Kreinto, plenumita estas nia ciklo** ene de la multaj cikloj de la Universo. En tiu tempo ni ekvilibrige kompensas la multajn vivojn kiuj estis prenitaj por provizi nian kontinuecon.

La paso en la venontan mondon kaj la proceso de enterigo estas tre dignaj kaj sakralaj eventoj en la vivo de nia popolo. Sed tiu digneco kaj sakraleco estas severe disrompitaj de la aktivecoj de la okcidentaj tombrabistoj ĉe nia popolo.

Ni provizas niajn parencojn per la aĝoj necesaj por ilia vojaĝo, kaj **redonas niajn parencojn en la sinon de nia Patrino Tero**, vestitajn en siaj plej belaj vestaĵoj. Ni metas iliajn korpojn dise en nia tuta lando, kaj ili agas kiel konstantaj memorigiloj de la cikloj en kiuj ni vivas.

La rajto de niaj prapatroj esti en paco ne estas respektata de la invadintoj. En multaj lokoj la tomb-rabistoj havas senrestriktan permeson malsakraligi la ripozejojn de nia popolo. La objektoj kiujn ni donis al niaj mortintoj por ilia vojaĝo, kaj iliaj vestaĵoj, finiĝas kiel vidindaĵoj malantaŭ montrofenestroj kaj en muzeoj. Plia insulto estas aldonita kiam tiuj estas garnitaj per misinformaĵo pri nia popolo.

La popolo de Usono estas kuraĝigata subteni tiujn ĉi ofendojn per la dolaroj de siaj kontribuoj kaj taksoj. Ĉiutage miloj da geknaboj estas grege kondukataj tra tiuj ĉi konstruaĵoj kaj igataj kredi ke tiuj ĉi praktikoj estas normalaj kaj akcepteblaj.

Multaj el niaj sakralaj enterigejoj estas malsakraligitaj per konstruo de baraĵoj, domejoj, industriejoj kaj aliaj ter-detruaj procesoj. Leĝoj estis aprobatataj, altrudantataj al nia popolo enterigajn ritojn fremdajn kaj kontraŭajn [al niaj kutimoj].

Ĉiuj tiuj agadoj estas genocidecaj kaj amasiĝas sur nia popolo : sekve, ili antaŭenigas la detruon de la spirita bonfarto de nia popolo (...)

**Ni alvokas** muzeojn, kolektantojn kaj aliajn hobiiistojn : ili redonu niajn sakralaĵojn, la [homajn] restaĵojn de nia popolo kaj la erojn de nia materiala heredo, por deca reenterigo. Ni alvokas por la redono de tiuj objektoj prenitaj ne el tomboj sed el nia popolo : ili estu redonataj por ilia kontinuigota uzo laŭ niaj vivmanieroj (...)

**Ni alvokas la organizitajn religiojn** : ili fariĝu niaj kunhelpantoj en la proceso de liberiĝo, kaj **ili ĉesu sian konkuradon pri niaj animoj**.

Kun la Plej Longa Marŝado mi iris al Vaŝingtono. Unu el la plej gravaj okazintaĵoj estas ke ni ricevis la subtenon de la nigruloj, la flavuloj, la blankuloj. Tio estis unu el la plej gravaj okazintaĵoj. La valideco de la marŝado estis en tiu ĉi unuiĝo de homoj venantaj kun unu penso, unu menso, unu koro. **Ni ĉiuj estas fratoj**, submetataj al la samaj [naturaj] leĝoj, kaj tio estas la plej fundamenta. Jen kie ni staras.  
(Oren Lyons, unu el la ĉefoj de la *Onondoga*-oj.)

(...) Ĉe tiu ĉi tempo en la historio, ni, kiel la origina popolo de tiu kontinento, estas la unikaj homoj vivantaj en tiu ĉi mondparto al kiuj restas **direktivo pri kiel esti homo en harmonio kun la Universo**. Tio estas la plej granda donaco kiun ni povas proponi al la tuta homaro.

Fine la junuloj de la Plej Longa Marŝado volas sciigi al niaj pliaĝuloj : ni ne povos sufiĉe **danki vin pro via daŭrigado de la tradiciaj kutimoj**. Se ne estus niaj pliaĝuloj, ni ne povus paroli kaj pensi ĉi-maniere hodiaŭ.

Ni, la gejunuloj, volas sciigi al niaj pliaĝuloj : tiel longe kiel estos spiro en niaj korpoj, **ni promesas neniam lasi viajn instruojn forgesiĝi. Ni promesas daŭrigi tiujn ĉi pacajn tradiciajn kutimojn**.

# La gabonaj ritaroj de la *iboga* : la *Buiti* de la Mitsoghoj

La origina *Buiti*, la *Buiti* de la Mitsogho-oj, aperis ĉe ili kiam ili atingis la teritorion nun nomatan Gabono. En pratempoj *Buiti* estis sinkretismo konsistanta el la kulto kontraŭ la prapatroj ekzaltita de la malkovro de la *iboga* (kiun eble alportis **Pigmeoj** el la ekvatora arbaro), kaj el kulturaj elementoj akiritaj dum la migrado de la Mitsoghoj.

Ĉe la Mitsoghoj (kaj la Bazinpi-oj), la *Buiti*-on oni strikte rezervas al la viroj ; kaj la inicitoj estas rigardataj kiel **Majstroj kaj unikaj gardantoj de la mistero** de la vida kono pri la transmorta mondo, kiun konigis al ili la "mirakla arbo" *iboga*. Tiu inicado nepre necesas por socia promocio en la tribo.

**La *iboga* alportas la pruvon** vidan, tuŝan kaj aŭdan pri nerefutebla ekzisto de transmorta mondo.

Pere de sia nedifektebla spirita substanco la homo apartenas al la du kampoj de la ekzistado, kiujn li konfuzas unu kun la alia ĉar li ne scias kiam komenciĝas naskiĝo kaj morto. La fizika morto perdas kian ajn signifon ĉar ĝi estas nenio alia krom nova vivo, alia ekzistado. "*La iboga kondiĉas la plurecon de la mondoj.*"

La *iboga* nuligas la nocion de tempo ; estanto, pasinto kaj estonto kunfandiĝas<sup>1</sup> : dank'al la *iboga*, la **homo reiras tien de kie li venas**.

La kandidatoj devas elteni elprovojn aŭ ritojn de transiro, kiuj komenciĝas en ĉirkaŭbaritejo strikte rezervita al la inicitoj. Ĉiu havas "patrinon" : maljuna vira inicito kiu zorgas ke la inican ceremonion oni faru laŭregule. La ceremonio konsistas esence el manĝado de raspitaĵoj de la planto *iboga*<sup>2</sup>. Tiu manĝadon antaŭas **abstinado** seksa kaj nutra dum la antaŭtago. La rito estas tre strikta kaj ĉiu ago havas grandan simbolan valoron.

Surfajre la plejaĝuloj rostas semojn de kukurbo. La bruo kiun iliaj eksplodoj faras, simbolas la eliron de la spirito por sia **mistika vojaĝo**. Iu trifoje frapas per martelo la kranion de la kandidato por liberigi lian spiriton. Oni pikas la langon de la "novnaskoto" per kudrilo : por doni al ĝi la povon raporti pri la venontaj vizioj.

Ĉar la manĝado povas daŭri plurajn tagojn, la elkorpiĝo kaj la reenkorpiĝo de la "novnaskoto" estas enscenigitaj antaŭ la apero de la vizioj. Oni kondukas la kandidatojn al la rivero, kaj miniatura pirogo farita el unu folio estas surakvigata kun brulanta torĉo sur ĝi. Tiu rito esprimas la vojaĝon de la spirito laŭ la fluo de la rivero al la okcidento,

la sunsubiro, la morto, kaj simbolas la elkorpiĝon. Meze de la fluo oni starigas palison sur kiu estas ligna strukturo diamanto-forma : ĝi reprezentas la inan seksorganon, kiun la kandidato devas trairi (je feta stato), naĝante kontraŭ la fluo de la rivero al la oriento, la leviĝanta suno, la naskiĝo.

Por montri tiun inican naskiĝon, oni razas kaj pudras la kapon de la "novnaskito" per ruĝa ligno, same kiel oni faras al vere novnaskita infano.

## Al la transa mondo

Kiam oni taksas kontentiga la fiziologion de la "novnaskito" post la manĝado, oni lin kondukas al la templo kaj lokigas en ties maldekstra parto, kiu simbolas inecon, mallumecon kaj morton. Li restas tie kaj manĝadas foliojn de *iboga*.

La efikoj de la drogo ekmanifestiĝas 20 minutojn post la unua gluto de *iboga*, per fortegaj kaj ripetigantaj vomadoj. "*La ventro de la novnaskito malpleniĝas eĉ de la lakto de lia patrino.*"

**Por iri en la transmortan mondon, necesas morti** : la korpo kuŝe restas sur la tero kun la plejaĝuloj, dum foriras la animo. La fiziologiaj signoj ekaperas : unue dormemo kaj poste gesta miskunordigado, granda agitado, tremado, ridado kaj plorado, parta anestezo kun sinsekvaj febro kaj malfebro, kaj anhelado ĝis sufokiĝo.

Por taksu la progreson de la toksado kaj alĝustigi la dozon, la respondeculoj palpas la pulson, aŭskultas la korbatadon, kontrolas la temperaturon nur tuŝante la korpon, kaj taksas ĝian sensivecon per pikado, en diversaj tempoj. Laŭ la fiziologia stato, la "patrinoj" fojfoje pligrandigas aŭ malpligrandigas la dozojn.

La sonĝaj efikoj ne aperas antaŭ deko da horoj, dum kiuj la ĉi-supre menciitaj ritaroj okazas, parte publike kun dansoj kaj muziko.

La viroj sub influo de *iboga* devas trairi kvar stadiojn por atingi viziaron konforman al la postulitaj normoj. La malnovaj inicitoj konstante demandas la kandidaton pri liaj vizioj, kaj la plejaĝuloj prijuĝas la valoron de la priskribita vizio.

La unua vizio konsistas el malprecizaj bildoj, nekoheraj, senordaj, malplenaj de religia signifo, kies aŭtentikecon la "novnaskito" ofte pridubas.

La duan stadion karakterizas serio da aperiaĵoj de iaj **minacaj bestoj**, kiuj foje disiĝas kaj aliffoje rekuniĝas rapide.



Dum la **tria stadio** la "novnaskito" fariĝas pli kaj **pli kvietaj**, kaj tio estas signo de kvietiga kaj plaĉa vizio, kiu forigas ĉiujn liajn dubojn pri la objektiveco kaj la pozitiveco de la vidaĵoj. La "novnaskito" sentas sin envolvita per blovo kiu fulmtuje transportas lin, per la muziko de la harpo Ngombi<sup>3</sup>, al **vastega vilaĝo sen komenco kaj fino**.

En la transmorta mondo voĉoj aŭdiĝas: "Kiun vi serĉas, fremdulo?"; la vojaĝanto respondas: "Mi serĉas la *Buiti*-on". La voĉoj subite fariĝas homaj formoj, kiuj denove demandas la demandon kaj tiam respondas ĥore: "Vi serĉas la *Buiti*-on. La *Buiti* estas ni, viaj prapatroj; ni konsistigas la *Buiti*-on."

La inicitoj tiam diras al la kandidato: "Vi estas sur la ĝusta vojo, la *Buiti* baldaŭ aperos. Daŭrigu, rigardu kaj vi trovos ĝin. Vi devas ne forlasi la bildojn; resekvu ilin de tie kie vi forlasis ilin." Voĉo donas al la kandidato lian nomon de inicito.

La novnaskiton konstante observadas lia "patrino", kiu reguligas liajn fiziologiajn reagojn por eviti intervenon de teruraj fantomoj, kiuj povus konduki lin sur la misa irejo, sur la vojo al morto.

La **kvaran stadion** de la vizio karakterizas renkontiĝo kun la plej eminentaj spiritaj estaĵoj. Post interparolado kun siaj prapatroj, la novnaskito subite sentas ke "liaj kruroj senmoviĝas antaŭ du Eksterordinaraj Estaĵoj", kiuj rivelas al li ke li estas en la "Vilaĝo de la *Buiti*-oj" (**la vilaĝo de la mortintoj**). Tiam ili demandas al li kial li venis tien.

Aŭdinte la respondon de la "novnaskito", la "Eksterordinaraj Estaĵoj" denove parolas. La unua diras: "Mia nomo estas Nzamba-Kana, la patro de la homa gento, la unua viro sur la tero"; kaj tiu kiu staras maldekstre de li, diras: "Mia nomo estas Disumba, la patrino de la homa gento (edzino de Nzamba-Kana), kaj la unua virino sur la tero."

Subite, plilumiĝantaj fajreroj kovras la "Vilaĝon de la Morto", kaj "fajro-globo" formiĝas kaj fariĝas distingebla (temas pri Kombe: la suno). Tiu globo da lumo demandas la vizitanton pri la kialoj de lia vojaĝo. "Ĉu vi scias kiu mi estas? **Mi estas la Estro de la mondo**, mi estas **la esenca punkto**. Tiu ĉi estas mia edzino Ngondi (la luno), kaj tiuj estas miaj gefiloj (Minanga: la steloj). La *Buiti* estas ĉio **kion vi propraokule vidis**." Post tiu interparolado la luno kaj la suno ŝanĝiĝas en belulino kaj belulon.

Senaverte la luno kaj la suno retrovas siajn originajn formojn kaj malaperas. La tondro (Ngadi) aŭdiĝas, kaj la kvieteco ĉien revenas.

La pliaĝuloj fiere salutas la ĵusan spertinton: "Li propraokule vidis la *Buiti*-on", kaj invitas lin al lokiĝo en la dekstra parto de la templo, parto kie

estas la viroj kaj la vivo. La kandidato fariĝis inicito malkovrante la *Buiti*-on tra alia realaĵo, transmorta, kiu rilatas kun ambaŭ mortoj, la fizika kaj la inica. Dank'al la vizio li samtempe ekvidas en estanteco, pasinteco kaj venonteco sian homan *mem*-on, spiritesenca neŝanĝeblan kaj samtempe vivantan sur du kampoj de ekzistado.

Tamen, post la transiraj ritoj oni devas izoli la novan membron disde la ekstera mondo dum periodo de unu ĝis tri semajnoj. Dum tiu tempo liajn manĝaĵojn kuiras kaj alportas juna virino ĵus naskinta, ĉar oni rigardas lin kiel novnaskiton.

**La inicito vidis, li scias kaj kredas**; sed, kiel ĉiu Mitsogho, li faros tiun vojaĝon nur duan fojon: en la tago de sia morto. Li neniel rajtos denove uzi *iboga*-n en la samaj kondiĉoj. Ekde tiam li do tre ŝpareme uzos la sanktan planton, por "refervorigi la koron" kaj por helpi lin "dum fizikaj strebadoj aŭ dum interparoladoj".

Aldone al la manĝado de *iboga*, la Mitsoghoj uzas la senigon je dormo ĉar la inicado daŭras plurajn **tagnoktojn sen dormo kaj nutraĵo**: rezultas vizioj dum kiuj **la individuo restas plene konscia**, kaj povas komuniki kun la ĉirkaŭantoj, tiel estante kaj spektanto kaj aganto de siaj propraj vizioj.

Rimarkindas ke la toksado per *iboga* estas tre grada; kaj tio ebligas observi la kvar karakterizajn stadiojn dum tiuj vizioj. Dum la tri unuaj stadioj la vizioj ŝajnas ekzakte konformaj al la tiel nomata "subtera mondo de Freud". La etnologoj rigardas la kvaran etapon kiel etapon de la normigaj vizioj, konforma al la kultura kaj kolektiva imago de la tribo (vidu la tezon de Jung).

Estas analogeoj kun vizioj spertitaj dum "**klinika morto**". La "novnaskito" devas alfronti morton, inican aŭ realan, kiu igos lin kapabla aliri al la transmorta mondo. Li povas realigi tion nur se li estas ĝuste preparita, kaj ĉefe se lia motivo estas sufiĉa. **Iuj ne kapablas transiri** tiun krizan fazon. Ilin ekkaptas demonaj genioj kiuj forlogas ilin de la vojo de la morto. La pliaĝuloj devas tiam decidi la ĉesigon de la inicado, per antidoto kies konsisto ne estas konata<sup>4</sup>, krom de la pliaĝuloj. □

**Robert Goutarel**

1/ Kiel en la "superluma universo" de Régis Dutheil.

2/ Tabernanthe *iboga* H.Bn var. *noke* et *mbassoka*.

3/ Sonoj de muzikarko akompanas la ceremonion. Ĝi esprimas ligojn inter la vilaĝo de la homoj sur tiu ĉi tero kaj tiu de la patro en la transmorta mondo. La muzikarko simbolas la vojon de la vivo kaj de la morto.

4/ Sciencistoj malkovris ke la atropino neniigas ĉiujn (viziajn kaj korajn) efikojn de la toksado per *ibogaino*.

(Trad. kaj sendita de D-ro Eric.Coffinet@wanadoo.fr)



# Interreligia dialogo en Uzbekio

La 13-9-2000 en Taŝkent, s-ro Koiĉiro Macura, direktoro de UNESKO, inaŭguris katedron pri komparaj religioj. Uzbeka islamo malfermiĝas al pluralo, same kiel al la scienca aliro al la religia fakto.

"De 30 jaroj, rimarkigas J. Baldock, anglikana aŭstraliano, *interreligia kunlaborado multege progresis. Flanka aktiveco fariĝas decidiga elemento de la institucia vivo. La religioj flankenmetis siajn triumfismajn aspektojn por disvolvi kunlaboradon.*"



*Benina vodu-a ĉeĥo kaj zen-monaĥo en Taŝkent*

Se origine la interreligia dialogo estis afero de kredantoj, ĝi pli kaj pli interesas la politikistojn, same de la ŝtatoj kiel de la grandaj internaciaj organizaĵoj. **UNo kunigis 2.000 homojn** en Nov-Jorko por la *"Pintkunveno de la Jarmilo"*. **Kaj UNESKO** estas ĉe la iniciato de la interreligia renkontiĝo en Taŝkent, de la 14-a ĝis 16-a de septembro, kaj de ties postkongreso pri sufismo en Bukhara.

UNESKO mendis vastan **internacian enketon**. Okcent publikaj respondeculoj kaj universitatoj resendis la demandarojn, laŭ kiuj ekzistas interreligiaj iniciatoj en 77 % el la landoj. El la sonditoj, 97 % rigardis ilin kiel utilajn por la paco, same kiel la interreligian dialogon.

La franca lamao Denys Töndrup, direktoro de la eŭropa budhana universitato, insistis pri komuna *"etika kaj spirita vidpunkto"*, trans la diferencoj.

Lia taja samreligiano Nantasarn Sisalab, alvokis al *"religio kiu povu pligrandigi la kvaliton de la vivo en mondo regata de la ekonomio"*. Jam temp' estas por, flanke de la NME (Nacia malneta enspezaro), ankaŭ NFE : "Nacia Feliĉ-Enspezo"<sup>1</sup>.

La tunizia juristo Abdelfattah Amor impresis, parolante kiel speciala raportisto de la UNa komisiono pri religia maltolero : *"La memprezento [de la religioj] tro ofte estas agresema ; ĝi prenas la formon de deklaro de [rilat]ĉesigo kun la alia[j]."* Pro tio, jena **ora regulo** : *"Militoj naskiĝas en la menso de la homoj. En la menso de la homoj prepariĝas la paco."* Rosa Maria Martinez de Codes, vicdirektorino de la Interreligiaj rilatoj ĉe la hispana ministrejo pri justico, diris ke oni devas evolui *"de kulturo de reago al kulturo de prevento"*.

Edukado ŝajnas esti la devizo. El la respondeculoj sonditaj de UNESKO 94 % subtenas ĝin kiel faktoron de kompreno inter la diversaj spiritaĵoj tradicioj. Kaj, kvankam devas ja partopreni en la disvastigo de kulturo de toleremo kaj paco la reprezentantoj de ĉiu religio, 79 % el la specimeno deziris esprimis ke **estiĝu nova kategorio de instruistoj : tiuj pri la interreligia**.

Denys Töndrup esprimis la ideon de [regula kaj internacia] interreligia televida dissendo (...) aŭ eĉ de interreligia televido... **J.P. Guetny**<sup>2</sup>

Cetere la *Asistilo*-redaktoro aldonas ke la lasta **ideo** jam estis **lanĉita en 1993**, okaze de la monda interreligia kunveno *Sarva-Dharma-Sammelana* en Bangaloro<sup>3</sup> : *"an international interfaith broadcasting system, encouraging mutual understanding, promoting co-operation at interfaith level"*<sup>4</sup> (laŭvorte : "internacia **interkreda dissenda sistemo**, kuraĝiganta reciprokan komprenon, antaŭeniganta kunlaboradon sur interkreda kampo").

Kaj jen ĝia **plej probabla fonto**. En sia *Letero al Radio Havano* (17-4-1990)<sup>5</sup>, s-ro Jaroslav Karhan imagis : *"Kosma ekumeno (mondkonsilio por unueco en diverseco religia) popularigadus rezultojn de siaj laboroj en samnomaj gazeto kaj regula radio-disaŭdigado, tutmonde aŭskultebla."*

Iomete plilarĝigante la ideon ĝis televido, la ASISTI-sekretario enŝovis ĝin en sian petitan revon pri la *"Stato de la mondo en ...2013"*, senditan en majo 93 al P-ro Luis M. Dolan, respondeculo pri la "Programo I" de la *Sarva-Dharma-Sammelana*. □

1/ Vortludo en la franca, pro samaj inicialoj "PNB".

2/ *Actualité des religions* n-ro 21 (nov. 2000), p. 9-10.

3/ Vidu *Asistilo* 13 p. 22, 14 p. 4 kaj noton en 17, p. 5.

4/ *Visions of an Interfaith Future*, red. C. & D. Storey, Oxford : International Interfaith Centre, 1994, p. 65.

5/ "Por tuthomara harmonio", en *Asistilo* 6, p. 58.

# La Serio pri Gilgameŝ :

( "De tiu ĉi Tabuleto, tre malbone konservita, restas [nur 90 versoj :] malpli ol unu triono." Jean Bottéro )

Kiam brilis  
iom da mateno,  
[alparolis] Gilgameŝ'  
[am]ikon sian (kvankam jam mortintan) :

"[Enkidu', amik', patri]no cia  
estis gazelino ;  
cia patro, cia generint',  
azen' sovaĝa :  
per on[agra] lakto  
estis ci nutrita !  
La herbejojn, ĉiujn,  
la sov[aĝaj] bestoj montris <al ci> !

Ĉiuj vojoj, kiujn Enkidu' surpaŝis  
[ĝis] la Arbareg' de l' Cedroj,  
[lin pri]plo[ru]  
tage, nokte kaj senĉese.  
Lin priploru ĉiuj maljunuloj,  
[en la] larĝaj [stratoj] de Uruk' la gregejĉirkaŭita!  
[Lin priploru]  
la popolamaso kiu sekvis nin kaj nin salutis!

Lin priploru  
la mallarĝaj [trapasejoj] de la montoj,  
[kiujn] ni tragrimpis  
[kune (?)] !  
La kampar' lamentu <pri li>,  
kvazaŭ (estus ĝi) patrino lia !  
[Lin priploru]  
(...) la Cipresoj kaj la Cedroj,  
inter kiuj, en furoro nia,  
[faris ni buĉadon (?)] !

Lin priploru la hienoj, ursoj (kaj) panteroj,  
la gepardoj, tigroj (?), (kaj) lionoj,  
la damaoj, cervoj, montaj kaproj kaj bubaloj,  
ĉiuj grandaj, etaj bestoj ja sovaĝaj !  
Lin priploru la rivero sankta Ulaja',  
ĉe kies bordo ni paradis,

lin priploru  
la Eŭfrat' sakrala  
kies akvon, el felsakoj niaj  
[ni o]fere [verŝis] !

Lin priploru la Viraro  
de Uruko ĉirkaŭita per gregejoj,  
[kiu vidis (nin) batali (?)]  
kaj mortigi la gigantan Virbovegon !

Lin priploru  
ĉiuj kamparanoj (...)  
kiuj ege laŭdis lian nomon  
per plej belaj laborkantoj.

Same (faru) [la loĝantoj]  
de la vasta Urbo (...) !

Same, la Paŝtistoj  
(...)

kiuj lin malsoifigis  
per bier' leĝera !

Same, [la Ŝafistoj]  
(...)

kiuj ekkonigis al li  
(panon kaj) buteron !

Same, (tiuj)  
(...)

kiuj buŝen verŝis al li  
(tiom da) trinkaĵoj plej bongustaj !

Same,  
la Hetajro,  
kiu ŝmiris lin (karese)  
per unĝvent' agrabla !

Lin priploru  
la invititaro,  
kiu por la edziĝfestoj  
metis al li ringon ĉirkaŭ l' fingron !  
(...)

Lin priploru (liaj) [frat]oj,  
kvazaŭ (estus tiuj ĉi) fratinoj :  
ili estu (por li) lamentantoj (?)  
(...),

kaj po[r li malligu]  
(siajn) harojn !

En ŝaf-stepo sia, liaj patro kaj patrin'  
priploru Enkiduon.

[Ankaŭ mi],  
mi cin priploras !

Min aŭskultu, Maljunuloj de la urb',  
[aŭskult]u min  
priplori mem  
[amikon] mian, Enk[iduon] !  
(kaj) [eksplo]di, kiel ploristino,  
per amaraj lamentadoj !

(Enkidu' !) Hakil' ĉe mia flanko  
kaj komfort' de miaj brakoj !  
spad' de mia ingo,  
ŝildo antaŭ mi,  
(...)

festvesto mia,  
kaj de mia petolad' la skarpo !  
(Jen) subite, [sort'] kruela  
cin el[ŝiris] de mi !

# funebro pri Enkidu (8-a Tabuleto)

[Ho amiko mia,] vagadanta [mu]!  
onagro de l' dezert', pantero de la stepo !  
[Enkidu' a]miko mia, vagadanta mul',  
onagro de l' dezert', pantero de la step',  
ni k[u]ne grimpis  
sur [la Monton],  
kaptis [kaj mortigis]  
la gigantan Virbovegon,  
buĉis Humbabaon  
en la [Cedr-]Arbar' [kaŝitan] ;  
Kio estas nun ĉi tiu dormo  
kiu [cin] ekkaptis ?  
Ci fariĝis malhelega  
kaj ci [min] ne aŭdas plu !"

Sed (Enkidu')  
ne levi[s (eĉ) ne] sian kapon !  
Gilgameŝ' lin palpis ĉe la brusto :  
lia koro [tute] ne plu batis !  
(Tiam), kiel (oni faras) por la novedzino,  
li vualis [la vizaĝon] de l' amiko !  
Li lin ĉirkaŭi[ris],  
kiel aglo ;  
kiel leonino  
senigita de la i[doj],  
li iradis, reiradis,  
antaŭ lin, malantaŭ lin senĉese ;  
li deŝiris kaj dissemis  
siajn buk[lojn] !  
Li disŝisris kaj forĵetis  
siajn belajn vestojn,  
kvazaŭ estus li kaptita de hororo !

Kiam [br]ilis  
io[m da maten']  
Gilgameŝ publikigis  
en la (tuta) land' alvokon (jenan) :  
"Metal[laboristoj] (kaj) fandistoj,  
[ŝtontajlistoj], orajistoj (kaj) gemistoj !  
faru [la statuon]  
de amiko mia !"

Tiel (do) farigis [Gilgameŝ']  
statuon de amiko sia  
(...)  
kies Brust' el lazurŝtonoj estis,  
kaj (la resto de) la korp' el oro !

(Ĉi tie preskaŭ mankas dudeko da versoj : nur la lastaj vortoj de ĉiu estas legeblaj. Plej probable temas pri priskribo de pluraj pezaj objektoj *el oro* metitaj apud la multvaloran bildon, el albastro, de lia amiko.)<sup>1</sup>

"[Ĉu (do) nun ne estos mi  
amiko, vera frato por ci ?]  
[Mi cin ripozigos]  
[sur grandega lito],  
[mi cin sturmos]  
sur kuŝe[j] agrabla],  
preparinte [ĉe maldekstro mia]  
[nemoveblan lokon] !  
Ĉiuj Princoj de la land'  
[piedojn ciajn venos kisi] !  
La loĝantojn [de Uruk']  
mi igos plori [kaj lamenti] pri ci !  
[Por ci igos mi funebri]  
la plej glorajn el [regatoj] (miaj) !  
Mi mem post ci (- cia malaper' en teron -)  
[taŭzos miajn harojn],  
kaj vestita nur per [leon]felo,  
[mi vagados en la stepo !]"

Kiam bri[lis]  
iom da mateno,  
Gilgameŝ' demetis (sian veston)  
(...)  
kaj surmetis (pro funebro) ruĝan  
(...)<sup>2</sup>

Kiam brilis iom da mateno  
Gilgameŝ' malfermis [de l'Palac' la Pordon],  
prenis grandan platon  
el *elammaku*-a ligno,  
per miel' plenigis  
ruĝan bovlon,  
per buter' plenigis  
bluan bovlon,  
[kaj la tuton (?)] (taŭge) aranĝitan,  
al Ŝamaŝ' prezentis.

(La resto de la Tabuleto VIII estas tro difektita por esti komprenebla, sed plurfoje temas pri oferoj.) □

## Notoj

1/ La kursivigitaj vortoj aperas sur la tabuleto, kaj, plurfoje, pezunuo egala al ĉ. 500 gramoj.

2/ Mankas pli ol 120 versoj (sur tri kolumnoj), verŝajne pri la entombigo de Enkidu. Nur tre malmultaj izolitaj vortoj estas legeblaj : "pro mia amiko" ; "lia tranĉilego" ; "la klingo [de lia glavo]" ; kaj la nomo de planedo "al" kiu oni sin turnas aŭ parolas (?) ; "Jugisto" inter la "inferaj diaĵoj" (*anunnaki*). Almenaŭ la fino estas diro (sed oni ne scias kiu parolas), ĉar la du lastaj versoj estas : "Tion ĉi aŭdante, [Gilgameŝ (?)]

# Pri Jesuo kaj Tibeto

Min [Ronald C. Peries] multe interesis la artikolo pri la nekonata vivo de Jesuo [en Asistilo 24, p. 6-7], sed mi havas kelkajn demandojn.

1. Ĝi aludas miaopinie al du libroj : la libro de Hersten "Ĉu Jesuo vizitis hindujon", kaj la antaŭa libro de Notoviĉ "La nekonata vivo de Jesuo" supozeble tradukita el tibeta manuskripto. Ĉu tiuj ĉi libroj havas la saman vidpunkton ?

En la artikolo mi koncentriĝis pri la dua libro kiun vi mencias, el ties franclingva originalo. La alia libro, de Holger Kersten, titoliĝas pli ekzakte, almenaŭ laŭ ĝiaj angla (1986)<sup>1</sup> kaj franca (1987) versioj : *Jesuo vivis en Bharato*. Do ne temas pri demando sed pri (plej probable senbaza) aserto ! Sed lia vidpunkto estas malsama ĉar li provas fari pli vastan sintezon, inkludigante aliajn librojn.

2. Fakte ĉu ekzistas du legendoj : unu, laŭ kiu Jesuo vizitis hindujon kaj mortis en Kaŝmiro, kie ekzistas lia tombo ?

Jes. Tiu ĉi legendo estis enkondukita de Mîrzâ Ghulâm Ahmad (el Qadyân, 1835 aŭ 39-1908), kiu sin proklamis mem Mesio kaj Mahdî (*daŭre* atendata de islamanoj) en 1891. En 1899 (kvin jarojn antaŭ ol krome deklari ke li estas ankaŭ avataro de Kriŝno), li verkis pamfleteton en la urdua, *Masih Hindustan mein* (La Mesio en Hindustano), kie "nenio estis konvinke pruvita" : "la scienca medio ne akceptis ion"<sup>2</sup> el tio. Sed la ideo estis semita, kaj kreskis paralele kun la Ahmadiyya movado fondita de li : en 1917 eŭropo estis jam atingita.

3. Laŭ la tiel nomata Tibeta Evangelio Jesuo ne mortis en Kaŝmiro (Bharato), sed en Palestino kiel la Nova Testamento rakontas.

Jes, jen ĝia tekstero mem (XIV,1-4) :

" Laŭ la ordono de la guberniestro [Pilato], la soldatoj kaptis Issa-n kaj la du rabistojn, kiujn ili kondukis al la loko de la [lasta] torturo, kie oni alnajlis ilin al krucoj stare plantitaj en tero.

La tutan tagon, la korpoj de Issa kaj de la du rabistoj restis pendantaj, elgutigante sangon, sub la gardo de la soldatoj ; la popolo staris ĉirkaŭe ; la parencoj de la torturatoj preĝis kaj ploris.

Ĉe la sunsubiro, la suferoj de Issa finiĝis. Li perdis la konscion, kaj la animo de tiu justulo dispartiĝis de lia korpo por iri neniĝi en la Dieco.

Tiel finiĝis la tera ekzisto de la reflekto de la eterna Spirito, en formo de homo kiu savis la harditajn pekulojn kaj eltenis tiom da suferoj."

4. Do la nomo "Juz Asaf" ne estas la sama kiel "Issa" ?

Yuz Asaf estas la nomo de iu "profeto", kies tombo en Ŝrinagar preskaŭ certe jam ekzistis en la unua duono de la XV-a jc. Ĝi eĉ devis esti sufiĉe sankta, ĉar en 1451 on elektis entombigi gravan homon apud tiu tombo. Ĝi estas menciita en dokumento el la XVIII-a jc. Post ankoraŭ (almenaŭ) unu jarcento oni identigis lin kun Jesuo, kiu estus :  
– aŭ "la ĉefo de la purigitoj" ĉar Jesuo resanigis leprulojn kiuj estus poste nomataj *asaf* ("purigitoj")  
– aŭ "tiu kiu rekunigas ('asaf) la Judojn (yhûdî)" ĉar "perditaj triboj" de Izraelo kolonius Kaŝmiron.

5. La "Tibeta Evangelio" mem ne estas citita en la artikolo ; kaj la traduko de citaĵoj de Notoviĉ, [pretende] rekte el la vortoj de la ĉef-lamao kontraŭdiras la esencan doktrinon de Budhismo. Krome ili mencias nenion pri reenkarniĝo.

Tute prave. Notoviĉ ne havis precizan konon pri budhismo kaj ties doktrino pri *an-âtman* kaj *anitya* ĉar li skribas : "Laŭ la budhistoj la animo de la justulo **kuniĝis kun la eterna Esto** [!] dum la [klasikaj] Evangeliistoj insistas prefere pri la supreniro de la korpo [de Jesuo]." (p. 172)

6. Kiam Tibetanoj aŭdis pri Jesuo ? Laŭ Dagpo Rinpoĉhe (vidu en Asistilo n-ro 24, p. 6), dum la vivo de la 13-a Dalai-Lamao ; sed mi legis ke ĉ. 1920 Sundar Singh [1889-193?] proklamis en la tibeta la evangelion, kaj ke li vizitis Tibeton de tempo al tempo. (Sundar Singh estis konvertulo el Sikhismo al [protestanta] Kristanismo.)

Kaj katolikoj antaŭe ; sed se kelkaj Tibetanoj aŭdis pri Jesuo en la XIII-a jc. (vd ĉi-apude), tamen :  
"Pri la religio kiun oni trovas en tiu reĝlando [Bhutano], mi ripetas al Via Respekteginda Moŝto kion ni kolektis dum la konversacioj kun tiu reĝo [Dharma-râja<sup>3</sup>, en 1627] kaj ties maljuna mentoro.

Ili diras ke ili neniam estis kristanoj kaj ke ili trovas nenion, en siaj libroj, ebligante aserti ke, en la tuta Tibeto, iliaj prauloj konis la Kriston, nian Sinjoron, aŭ sekvis lian Leĝon." □

1/ Kersten verkis la antaŭparolon en marto 1983.

2/ Mohammad Yasin, en la antaŭpar. de sia *Rauzabal kaj aliaj misteroj de Kaŝmiro*, Srinagar : Kesar, 1972, p. ii.

3/ "Rigardata kiel la plej scianta kaj influa el ĉiuj ĉef-lamaoj, kiuj estas [nur] ses en ĉiuj unuiĝintaj reĝlandoj de Tibeto." (Raporto de la jezuito Estêvão Cacula.)



# Unuaj katolikaj misiistoj en Tibeto

## W. de Ruysbroek (XIII-a jc.)

Sendita de sankta Ludoviko la IX-a kiel ambasadoro, la flandra franciskano Wilhelmo de Rubruk trairis la eŭropazian kontinenton en 1253-54.

Möngke-Ĥano kunvenigis teologian kolokvon honore al la alveninto kiu (post gastado ĉe nepo de Ĝingis-Ĥano) restadis ses monatojn ĉe lia mongola kortego en Karakorumo. Tie sin miksis ĉiuj religioj: ŝamanismo, diversaj budhismoj, sunaisma kaj ŝijaismo, islamismo, nestoriana, ortodoksa kaj katolika kristanismoj. Kvankam li **ne vizitis Tibeton**, Rubruk estis la **unua eŭropano kiu renkontis tibetajn lamaojn**<sup>1</sup>.

Lia raporto vekis viglan intereson inter la *okcidentaj* intelektuloj kaj scienculoj, sed ne atingis la popularecon de la libro de **Marko Polo** kiu, alveninte en Pekino en 1275, ricevis de Kubilai-Ĥano **gravajn misiojn en Tibeto**.

## Oderie de Portenone (XIV-a jc.)

Supozeble tiu Frato atingis *Lhasa* en 1325, sed lia **raporto estas dubinda** (laŭ E. Candler, partopreninto de brita ekspedicio ĝis *Lhasa* en 1904).

## Hieronimo Xavier (XVI-a jc.)

Dum vojaĝo en Kaŝmiro kun la sekvantaro de la imperiestro Akbaro<sup>2</sup>, en 1597, jezuitoj aŭdis pri *Tebat* ("kie estas preĝejoj, monaĥoj kaj episkopoj").

La nevo de sankta Francisko Xavier (fondinto de la Jezuita Societo), verkis en la portugala kaj en la persa, la tiama **internacia lingvo**, leteron adresitan al la tibeta episkoparo! La sekvan jaron, iu diris al li ke tie "*multaj geviroj profesias virginecon kaj vivas kiel gemonaĥoj en specialaj konstruaĵoj kies enirejo estas malpermesata al aliaj homoj*".

## Bento de Góis (XVII-a jc.)

En 1602 tiu ĉi iris ĝis Uzbekio, de kie li sekvis la "Silkan Vojon". Li **ĉirkaŭiris Tibeton sen eniri ĝin**; sed li havis la eblecon viziti, en la prizono de la sultano de Yarkand, la **eksreĝon de Ladakho**, kun kiu li povis paroli dank' al tibeta-persa interpretanto. De tiu interparolado en islama lingvo, li [erare] konkludis ke la loĝantoj de tiu lando preĝas ne en moskeoj sed en kirkoj, havas needziĝintan klerikaron, fastas dum Karesmo kaj uzas kiel sanktan Libron la *Inĝil*: la Evangelion.<sup>3</sup>

**Tial Notoviĉ havis la ideon "malkovri" sian Vivo de Sankta Issa**, la de li pretenditan "Tibeta Evangelio", en la ĉefa monaĥejo de Ladakho.

## A. de Andrade (XVII-a jc.)

En 1624 tiu ĉi iris laŭ la itinero Agra - Delhio - Ŝrīnāgar - Badrīnāth (3170 m.) - Mana - unu el la 4 fontoj de Gango, ĉe la lago Deb Tal - la trapasejo Mana (5450 m.), ĝis Tsaparang.

Li revenis kun jena letero<sup>4</sup> de la (lasta) reĝo de Gu-ge, Thi Taŝi Dagma (Khri bKraŝis gragspa lde):

"Mi, reĝo de la reĝlando *Potente* [Bhoŝanta, t.e. Tibeto], ricevante grandan ĝojon pro la vizito de patro Ant3nio, *farangi*<sup>5</sup>, en mia lando, veninta por instrui al ni la sanktan leĝon, mi prenas lin kiel *nian majstron, ĉef-lamaon*<sup>6</sup>. Mi donas al li la tutan aŭtoritaton por povi libere prediki kaj instrui la sanktan Leĝon al niaj popoloj. Mi ne konsentos ke kiu ajn faru embarasojn al li pro tio. Mi ordonas ke estu donacita al li loko kaj la tuta helpo kiun li volos, por konstrui preĝejon (...)

Mi insiste petas la grandan patron [la jezuita superulo] tuj [re]sendi al ni la menciitan P-ron Ant3nio por alporti [spiritan] helpon al niaj popoloj.

En *Chaparangue*, stampita per miaj sigeloj..."

Ĉe Pasko 1626 la reĝo metis la unuan ŝtonon de la preĝejo dediĉota al la "Virgulino de Espero", por kiu lamaoj fabrikis kaj portis brikojn.

Sed en 1631 tiu reĝlando Gu-ge estis invadata de Ladakho, kies reĝo forprenigis "*multajn kristanojn*"<sup>7</sup> en kaptiteco. En 1635 raporto precizigis ke "*la nombro de baptitoj ne atingis cent*" kaj la lastaj restaĵoj de la kristanaro transiris al islamismo "*kiam ni estis devigataj ne plu provizi iliajn bezonojn*".<sup>8</sup>

Ne retroveblas spuroj de la bela preĝejo.<sup>9</sup> □

1/ Krom plej probable la franciskano el Peruĝo Giovanni dal Piano dei Carpini, sendita de la papo Inocento la IV-a. En 1246 li restadis 4 monatojn ĉe la kortego, en Karakorumo, de Gŭyŭk-Ĥan, kies surtronigon li ĉeestis.

2/ Pri tiu ĉi, vi povas plezure legi *Akbar*, romanon de van Limburg Brouwer, trad. de ges-roj Isbrŭcker kaj J. Ziermans, Den Haag: Int. Cseh-Inst. de E., 1936<sup>2</sup>, 215 p.

3/ F. Guerreiro, *Relaçam das cousas que fezeram os Padres S.J. nas partes da India...*, Lisbono, 1609, p. 165.

4/ *Novo descobrimento do Gr3o-Cataio ou reinos de Tibete* (en B. da Fonseca, *As grandes viagens*, 1964<sup>2</sup>, p. 253)

5/ "Franko", kio signifas pli ĝenerale: eŭropano.

6/ "*lamb3 maior*": portugala transskribo de *blama*.

7/ F. de Azevedo, en *Les portugais au T.*, 1996, p. 183.

8/ Raporto de la jezuita misiisto Nuño Coresma, en *Archivum Romanum Societatis Jesu*. Goa 73, f<sup>o</sup> 99.

9/ J. Aschoff, *Tsaparang K3nigsstadt in West-Tibet*, Mŭnich, 1989, p. 81.

# La Serĉado de l'Sankta Gralo :

[129,25] [Lancelot] chevauche par mi la forest toute jor jusqu'a hore de vespres (...) Après vespres encontra une damoisele qui chevauchoit un palefroi blanc et venoit grant oirre. Et la ou ele voit Lancelot, si le salue et li dist :

" Sire chevaliers, ou alez vos ?

– Certes, fet il, damoisele, je ne sai, fors la ou aventure me conduira. Car je ne sai mie bien quel part je puisse trover ce que je vois querant.

– Je sai bien, fet ele, que vos querez. Vos en fustes jadis plus pres que vos n'estes ore, et si en estes plus pres que onques mes ne fustes, se vos tenez en ce ou vos estes entrez.

– Damoisele, fet il, ces deus paroles que vos me dites me semblent estre contraires.

– Ne vos chaut, fet ele, vos le verroiz encore plus apertement que vos nel veez ore, ne je ne vos ai chose dite que vos encore bien n'entendez."

Quant ele ot ce dit, et ele s'en volt aler, il li demande ou il porra hui mes herbergier.

" Vos ne troveroiz, fet ele, anuit hostel ; mes demain le troveroiz tel com mestier vos sera, et lors avroiz secors de ce dont vos estes en doutance."

Il la comande a Dieu et ele lui ; si se part li uns de l'autre et chevauche tout le chemin par mi le bois, et tant qu'il li anuite a l'entree de deus chemins forchiez, ou il avoit une croiz de fust ou de partement des deus voies.

Quant il voit la croiz, si fu mout liez de ce qu'il l'a trovee et dit que meshui sera ilec ses ostiex. Si l'encline et descent, et oste a son cheval le frain et la sele, et le lesse pestre ; et oste son escu de son col et deslace son hiaume et l'oste de sa teste ; et s'age-noille devant la croiz et dit ses proieres et ses oraisons, et prie Celui qui en la Croiz fu mis, por qui honor et remembrance ceste fu mise ci, qu'Il le gart en tel maniere qu'il ne chiee en pechié mortel. Car il ne doute tant nule chose come il fait le renchaoir.

*Tiam li foriras, kaj rajdas tra la arbaro la tutan tagon ĝis la horo de vesproj (...) Post la vespra horo li renkontis fraŭlinon kiu rajdis blankan ĉevalon kaj venis grandrapide ; kaj kiam ŝi ekvidas Lanceloton, ŝi lin salutas kaj diras al li :*

" Sinjoro kavaliro, kien vi iras ?

– Nu fraŭlino, li diras, mi ne scias, krom tien kien aventuro min kondukos. Ĉar mi ne bone scias en kiu direkto mi povos trovi, kion serĉante, mi iras.

– Mi bone scias, ŝi diras, kion vi serĉas. Vi iam estis pli proksima al ĝi ol vi estas nun, kaj vi estas pli proksima al ĝi ol vi iam ajn estis se vi vin tenos en tio kien vi eniris. – Fraŭlino, li diras, tiuj du paroloj kiujn vi diras al mi, ŝajnas al mi esti kontraŭaj.

– Ne gravas, ŝi diris, vi vidos tion ankoraŭ pli malkaŝe ol vi ĝin vidas nun, kaj mi ne diris al vi ion kion vi ne jam bone komprenas."

*Kiam ŝi estas dirinta tion kaj volas foriri, li demandas ŝin kie li povos hodiaŭ gasti.*

" Vi ne trovos, ŝi diras, gastejon ĉi-nokte, sed morgaŭ vi trovos tian kia estos necesa al vi, kaj tiam vi ricevos helpo pri tio pri kio vi hezitas."

*Li konfidas ŝin al Dio kaj ŝi lin ; tiam ili disiĝas kaj li rajdas sian tutan vojon tra la arbaro, kaj tiom ke noktiĝas ĉe la forka deirpunkto de du vojoj, kie estis kruco el traboj ĉe la disiĝo de la du vojoj.*

*Kiam li vidis la krucon, li multe ĝojis pro tio ke li ĝin trovis, kaj diris ke hodiaŭ ĉi tie estos lia loĝejo. Tiam li ĝin salutas per kliniĝo kaj deĉevaliĝas kaj forprenas de sia ĉevalo la mordajon kaj la selon, kaj lasas ĝin paŝtiĝi ; kaj li demetas sian ŝildon de sia kolo kaj mallaĉas sian helmon kaj demetas ĝin de sia kapo ; kaj li genuiĝas antaŭ la kruco kaj diras siajn fiksjajn kaj siajn liberajn preĝojn, kaj li petas Tiun kiu sur la krucon estis metita, por kies honoro kaj memoro tiu ĉi estas starigita ĉi tie, ke Li lin gardu laŭ tia maniero ke li ne falu en [spirit]mortan pekon. Ĉar li ne timas pri io tiom kiom pri la refalo.*

## La vizia sonĝo

Quant il ot fete s'oroison et prié Nostre Seigneur grant piece, si s'acoute sor une pierre qui ert devant la croiz. Et il avoit talent de dormir, car il ert las et travailliez dou geuner et dou veillier ; et por ce li avint qu'il s'endormi maintenant qu'il fu acoutez seur le perron.

Quant il fu endormiz, si li fu avis que devant lui venoit uns hons toz avironnez d'estoilles ; et avoit en sa compaignie set rois et deus chevaliers et avoit une couronne d'or en sa teste.

*Post kiam li faris sian preĝon kaj preĝis Nian Sinjoron dum longa tempo, li sin kuŝis sur ŝtonego kiu estis antaŭ la kruco. Kaj li havis deziron dormi ĉar li estis laca kaj turmentata de fasto kaj de nedormado [la antaŭan nokton] ; kaj pro tio, okazis al li ke li endormiĝis tuj kiam li kuŝis sur la ŝtona benko.*

*Kiam li dormis, tiam ŝajnis al li ke antaŭ lin venis homo tute ĉirkaŭita de steloj ; kaj tiu havis en sia kompanio sep reĝojn kaj du kavalirojn, kaj li havis kronon el oro sur sia kapo.*

## XIII – Vizia sonĝo de Lancelot

Quant il estoient venuz devant Lancelot, si s'arestoient et aoroient la croiz et fesoient ilec lor afflictions. Et quant il avoient grant piece esté a genoillons, si s'aseoient tuit, et tendoient tuit les mains vers le ciel et disoient a haute voiz :

*"Peres des cielx, vien nos visiter, et rent a chascun selon ce qu'il avra deservi, et nos met en ton ostel, en la meson ou nos desirrons tant a entrer !"*

Quant il avoient ce dit, si se tesoient tuit. Lors resgardoit Lancelot vers le ciel et veoit les nues ouvrir, et en issoit uns hom a grant compaignie d'anges ; et descendoit sus ax et donoit a chascun sa beneïçon et les clamoit serjanz bons et loiax et lor disoit :

*"Mes ostiex est apareilliez a vos toz : entrez en la joie qui ja ne faudra." Et quant il avoit ce fet, si venoit a l'ainzné des deus chevaliers et disoit :*

*"Fui t'en de ci ! car je ai perdu quan que je avoie mis en toi. Tu ne m'as pas esté fil, mes fillastre ; tu ne m'as pas esté amis, mes guerriers. Je te di que je te confondrai, se tu ne me renz mon tresor."*

Quant il ooit ceste parole, se s'enfuoit d'entre les autres et crioit merci tant dolenz que nus plus.

Et li hons li disoit :

*"Se tu velz je t'amerai, se tu velz je te harrai."*

Et cil se departoit maintenant de la compaignie. Et li hons qui de vers les cielx estoit descenduz venoit au plus juene chevalier de toz et le muoit en figure de lyon et li donoit eles et li disoit :

*"Biax filz, or puez aler par tot le monde et voler sus tote chevalerie."*

Et cil començoit a voler, et devenoient ses eles si granz et si merveilleuses que toz li monz en estoit coverz. Et quant il avoit tant volé que toz li monz le tenoit a merveille, si s'en aloit contremont vers les nues ; et maintenant se ovroit li ciex por lui recevoir, et il entroit enz sanz plus demorer.

Einsi avint a Lancelot qu'il vit ceste avision en son dormant. Quant il vit qu'il fu jorz, il aleve sa main et fist croiz en son front ; et se comande a Nostre Seignor et dit : *"Biax peres Jhesucrist, qui es verais sauverres et verais conforz a toz cels qui e bon cuer te reclaime[n]t, Sire, toi aor je et rent graces et merciz de ce que tu m'as garanti et delivré des granz hontes et des granz amuiz qu'il me convenist a soffrir, se ta grant deboneté ne fust. Sire, je sui ta creature, a qui tu as mostree si grant amor que quant l'ame de moi estoit apareilliee d'aler en enfer et en perdicion pardurable, tu par ta pitié l'en as gitee et rapelee a toi conoistre et criembre.*

*Kiam ili alvenis antaŭ Lancelot, ili haltis kaj kultis la krucon, kaj faris tie siajn [ĝisterajn] kliniĝegojn. Kaj post kiam ili longe restis sur la genuoj, ili ĉiuj sidiĝis kaj ili ĉiuj etendis la manojn al la ĉielo kaj diris per laŭta voĉo :*

*"Patro el la ĉielo, venu viziti nin kaj redonu al ĉiu laŭ kiom li estos meritinta, kaj metu nin en cian loĝejon, en la domon kien ni tiom deziras eniri !"*

*Post kiam ili diris tion, ĉiuj silentis. Tiam Lancelot rigardis al la ĉielo kaj vidis la nubojn malfermiĝi, kaj eliris homo kun granda kompanio de anĝeloj : li malsuprenvenis super ilin kaj donis al ĉiu sian benon kaj proklamis ilin servistoj bonaj kaj lojalaj. kaj diris al ili : "Mia loĝejo estas preta por vi ĉiuj : eniru en la ĝojon kiu neniam falos."*

*Kaj post kiam li faris tion ĉi, li venis al la pli aĝa el la du kavaliroj kaj diris : "Fuĝu de ĉi tie ! ĉar mi perdis ĉiom kiom mi metis en cin. Ci ne estis por mi filo sed filaĉo ; ci ne estis por mi amiko sed malamiko. Mi diras al ci ke mi cin konfuzos se ci ne redonos al mi mian trezoron." Kiam tiu aŭdis ĉi tiun parolon, li fuĝis el inter la aliaj kaj li krie pardonpetegis tiom lamente kiom neniu [povus] pli.*

*Kaj la homo diris al li : "Se ci volas, mi cin amos ; se ci volas, mi cin malamegos." Kaj ĉi tiu tuj disiĝis de la kompanio.*

*Kaj la homo kiu malal la ĉielo malsuprenvenis iris al la plej juna kavaliro el ĉiuj. kaj transformis lin en figuron de liono kaj donis al li flugilojn, kaj lin diris : "Bela filo, nun vi povas iri tra la tuta mondo kaj flugi super la tuta kavalaro."*

*Kaj tiu ĉi ekflugis kaj liaj flugiloj fariĝis tiel grandaj kaj tiel mirindaj ke la tuta mondo estis kovrita per ili. Kaj post kiam li tiom flugis ke la tuta mondo rigardis lin kiel mirindaĵon, li iris supren al la nuboj ; kaj tuj la ĉielo malfermiĝis por lin ricevi kaj li eniris sen plu resti.*

*Tiel, okazis al Lancelot ke li vidis ĉi tiun sonĝon en sia dormado. Kiam li vidis ke tagas, li levis sian manon kaj li faris kruco[signo]n sur sia frunto ; kaj li konfidis sin al Nia Sinjoro kaj diris :*

*"Bela patro Jesukristo, vera savanto kaj vera refortigo de ĉiuj kiuj el bona koro cin vokas, Sinjoro, cin mi adoras kaj dankas pro tio ke ci min ŝirmis kaj liberigis de la grandaj hontoj kaj de la grandaj penoj kiujn mi devus suferi se ne estus cia granda boneco. Sinjoro, mi estas cia kreitaĵo, al kiu ci montris tiel grandan amon ke, kiam mia animo estis preta iri en inferon kaj en daŭran perdiĝon, ci per cia kompato ĝin el tio tiris kaj revokis por ke ĝi cin konu kaj timu.*

*Sire, par ta pitié, ne me lai des ore mes aler fors de droite voie, mes garde moi de si pres que li anemis, qui ne bee fors a moi decevoir, ne me truisit fors de tes mains !"*

Quant il a ce dit, si se redrece en estant et vient a son cheval et li met la sele et le frain. Si lace son hiaume et prent son escu et sa lance et monte ; et se met en sa voie ausi come il avoit fet le jor devant, et pense a ce qu'il avoit veu en dormant, car il ne set onques a quoi ce puet torner. Si le voldroit volentiers savoir s'il pooit estre. (...)

[132,28] Et chevauche jusqu'au soir. Et lors fu vains et las, come cil qui n'avoit mengié de tot le jor ne de l'autre devant ; si ot chevauchié deus granz jornees qui assez l'orent lassé et traveillié.

Tant a chevauchié qu'il vint par devant un hermitage qui estoit en une montaigne. Il regarde cele part et voit devant l'uis seoir un hermite, vielz hons et anciens. Et il est mout liez ; si le salue, et cil li rent son salu bel et cortoisement.

*"Sire, fet Lancelot, porriez vos herbergier un chevalier errant ?*

*– Biau sire, fet li preudons, s'il vos plest je vos herbergerai hui mes au mielz que je porrai, et vos donrai, fet li preudons, a mengier de ce que Dieu m'a presté."*

Et il dit qu'il ne demande mielz ; et li preudons prent le cheval et le meine en un apentiz qui estoit devant son ostel, et li oste li meismes la sele et le frain, et li done de l'erbe dont il avoit laienz a plenté. Puis prent l'escu et le glaive Lancelot et le porte en son ostel. Et Lancelot ot ja deslacié son helme et sa ventaille abatue ; si oste son hauberc de son dos et le porte en l'ostel. Et quant il est touz desarmez, li preudons li demande s'il a oï vespres. Et il dit qu'il ne vit home ne fame ne meson ne recet (...)

Lors entre li preudons en sa chapele et apele son clerc et comence vespres dou jor et puis de la Mere Dieu. Et quant il ot ce dit qui au jor apartenoit, si s'en issi de la chapele. Lors demande a Lancelot qui il estoit et de quel país. Et il li dit son estre ne ne li çoile mie chose qui avenue li soit del Saint Graal.

Quand li preudons ot ceste aventure, si li prent grant pitié de Lancelot, car il voit qu'il comença a plorer des lors qu'il conta l'aventure dou Saint Graal. Lors li requiert ou non de sainte Marie et de sainte creance qu'il li die toute sa confession et tout son estre. Et il dist que si fera il volentiers, puis qu'il le velt (...) et Lancelot li conte toute sa vie (...), puis li requiert por Dieu qu'il le conselt.

Sinjoro, per cia kompato, ne lasu min de nun iri for de la rekta vojo, sed gardu min de tiel proksime ke la malamiko kiu ne esperegas ion krom trompi min, ne trovu min for de ciał manoj !"

*Post kiam li diris tion, li tuj stariĝas kaj venas al sia ĉevalo kaj metas la selon kaj la mordajon. Li laĉas sian helmon kaj prenas sian ŝildon kaj sian lancon, kaj surĉevaliĝas ; kaj li ekiras tiel kiel li faris la antaŭan tagon, kaj pensas pri kion li vidis dormante, ĉar li ne scias al kio tio povos iam evolui. Tamen li volonte volus ekscii tion se eblus (...)*

*Kaj li rajdis ĝis la vespero. Kaj tiam li estis senforta kaj laca kiel iu kiu ne manĝis dum la tuta tago nek dum la antaŭa. Li estis rajdinta du longajn tagojn, kiuj sufiĉe lacigis kaj turmentis lin.*

*Tiom li rajdis, ke li alvenis antaŭ ermitejon kiu estis sur monto. Li rigardas en tiu direkto kaj vidas antaŭ la pordo sidi ermiton, maljunan kaj multaĝan homon. Kaj li estas multe ĝoja ; li salutas lin kaj tiu reciprokas al li sian saluton bele kaj afable.*

*"Sinjoro, demandas Lancelot, ĉu vi povus gastigi vagantan kavaliron ?*

*– Bela sinjoro, respondas la noblulo, se plaĉas al vi mi vin gastigos hodiaŭ tiel plej bone kiel mi povos, kaj donos al vi, diras la noblulo, manĝaĵon el kio Dio pruntedonis al mi."*

*Kaj tiu ĉi diras ke li volonte akceptas ; kaj la noblulo prenas la ĉevalon kaj kondukas ĝin en flankremizon kiu estis antaŭ lia domo, kaj li deprenas mem la selon kaj la mordajon, kaj donas al ĝi herbon kiu abunde estis tie. Poste li prenas la ŝildon kaj la glavon de Lancelot kaj ilin portas en sian domon. Kaj Lancelot jam mallaĉis sian helmon kaj forigis sian spirtruojon ; tiam li demetas sian maŝkuton de sur sia dorso kaj portas ĝin en la domon. Kaj kiam li estas tute senarmaĝigita, la noblulo demandas lin ĉu li aŭdis vesprojn. Kaj tiu ĉi diris ke li ne vidis viron nek virinon nek domon nek rifuĝejon (...)*

*Tiam la noblulo eniras sian kapelon kaj vokas sian novicon kaj komencas la vesprojn de l'tago kaj poste tiujn al la Patrino de Dio. Kaj post kiam li diris tion kio apartenis al la tiutaga ofico, li eliris el la kapelo. Tiam li demandas al Lancelot kiu li estas kaj el kiu regiono. Kaj tiu ĉi diras al li sian situacion kaj kaŝas antaŭ li nenion kio okazis al li rilate la Sanktan Gralon.*

*Kiam la noblulo aŭdas tiun ĉi aventuron, tiam kaptas lin granda kompato por Lancelot, ĉar li vidas ke li komencis plori kiam li ekrakontis la aventuron de la Sankta Gralo. Li do petas lin nome de sankta Mario kaj de la sankta fido, ke li diru sian tutan konfesion kaj sian tutan situacion. Kaj li diras ke li volonte faros tion pro tio ke ĉi tiu volas tion ; kaj li rakontas al li sian tutan vivon, kaj poste petas lin pro Dio ke li konsilu lin.*



# Kristnaska kaj Novjara mesaĝo

Jena teksto (mallongigita de la Red.) estis sendita de **Enrico Marzola** nome de "Tutmonda interfratiĝo de religioj" en antaŭa jaro. sed ni ne povis aperigi ĝin en la konvena tempo. (Vidu lian leteron en n-ro 25 p. 27.)

"Vi ĉiuj estu unu."

Iam misiistoj, altiritaj de lia kreskanta famo, iris viziti Hazur Sawan Singh, sanktulon el Beas, Bharato (1858-1948). Ili deziris ekscii lian opinion pri la rolo kaj naturo de aŭtenta spirita majstro.

Hazur klarigis al ili per jena ekzemplo: "Ni supozu ke via 6-jara infano iras kunamikoj viziti foiron kiu okazas iom for de via hejmo. En la postagmezo ilin surprizas pluvego. Ĉiuj knaboj revenas en sian hejmon, krom la via. Noktiĝas, sed pri la infano estas nenia spuro. Via edzino kuras serĉi vin en via oficejo aŭ aliloke, kaj, kun larmoj ĉe la okuloj, diras al vi ke via filo perdiĝis. Ĉu vi ne tuj kurus serĉi lin, sen eĉ surmeti ĉapelon? Certe jes.

Kaj do, ĉu nia ĉiela Patro, oceano da kompatato, amo, simpatio kaj bonkoreco, ne malsupreniros por savi siajn filojn kaj tiri ilin el ĉi tiu terura oceano da mizero, doloro, sufero kaj aflikto?"

Hazur plie aldiris citaĵojn el diversaj Skriboj:

– Swami Ĝi, la sankta majstro el Agra, aludante sian spiritan mision, asertis: "*La Sinjoro alprenis homan formon kaj malsuprenvenis en la mondon kiel majstro por vekti la animojn*".

– Bulleh Shah, la islama mistikulo, diris: "*Jen, Dio descendis subforme de homo*".

– Maŭlana Rumi, la granda persa mistika poeto, parolante pri sia majstro, skribis: "*En la persono de la majstro estas kaŝitaj kaj Dio kaj la Profeto*".

– Kaj lia majstro, Ŝams-i-Tabriz, konfirmis: "*La granda Suvereno fermis la pordon de sia palaco. Poste li vestis sin per homa korpo kaj malsupreniris por remalfermi la pordon*".

– Guruo Arĝun, la kvina majstro de la Sikhoj, aldiris: "*La majstro estas la Kreinto, la Faranto. Ekzistas nenio krom la povo de la majstro. Kion li deziras, tio ja veriĝas*".

"Eble tio ne estas tre facile kredebla por vi", finis Hazur sin turnante al la misiistoj, "sed tio ne estas alia ol "*kaj la Parolo enkarniĝis*" (Jn 1,14).

"Judismo, kristanismo, islamo kaj la ceteraj religioj estas kiel riveroj elfluantaj el unu superega Fonto. Pro tio **mi ĉiam konsilas ne limigi sian konadon al unu sola religio**: fine oni ne plu aldirektus sin al la solola Fonto de ĉiuj."

Al-Ĥallaĝ, islama mistikulo (857-922) krucumita en Bagdado ĉar li asertis: "*Mi estas la Vero*".



**Sant Kirpal Singh** (1894-1974), disĉiplo de Hazur, konfirmis en nia epoko mem: "*La majstro estas la Homo-Dio. Li estas Dio en la homo*".

En la Biblio oni parolas pri "*la Filo de Dio*", dum en la ceteraj Skriboj oni ĝenerale diras ke Dio alprenis homan korpon: sed inter Dio kaj lia Filo, kompreneble estas nenia diferenco.

(...) Neceso de nia tempo estas aŭtenta ekumenismo, kiu signifas sidi kiel fratoj sur sama nivelo: tio jam okazas per ĉiujaraj renkontiĝoj ekde kiam, unuafoje, la Ĉefoj de la diversaj religioj decidis kunveni en Asizo (1986) kaj ĉiu el ili preĝis laŭ sia propra maniero la ununuran Dion de ĉiuj.

La taskon reporti inter la homojn la unuecon kaj la Konadon, mirinde plenumis Kirpal Singh en la 26 jaroj de sia misio, dum kiu li estis prezidanto de la "Tutmonda interfratiĝo de religioj".

La majstroj venas konverti la homojn ne por ke ĉi tiuj ŝanĝu siajn eksterajn morojn kaj religiojn sed por instigi ilin al interna konvertiĝo.

Instruante al la homoj kiel leviĝi super la fizikan konscion por ekkoni sian spiriton kaj, per tiu, ekkoni Dion, la majstroj travivigas ian rektan sperton pri la lasta Realo, ĉiutempe kaj ĉiuloke identa.

Tial, **celebri la naskiĝon de Kristo** signifas implicite omaĝi al ĉiuj grandaj Animoj, kiuj gvidis al la Lumo kaj al la Vero la survojan homaron.

**Kun niaj plej fervoraj deziroj pri lumoplena Kristnasko kaj pri Novjar[mil]o spirite riĉa.**

## [Plia, ne tiom] "Probabla"

Tria parto, la plej "nova", el franclingva artikolo de abonanto (**M-ro Gall Laigle**, episkopo de la Kelta Ortodoksa Eklezio), sendita de Solange Durou, ankaŭ abonantino. (Kun postaj notoj kaj kritiko de la Red.)

Jam komence de la 20-a jarcento, la demando pri la registrado [pro dekreto de Cezaro Aŭgusto, (Lk 2.1). kaj dum kiu Jozef supreniris al Bet-Leĥem "por registriĝi kune kun Marjam, lia fianĉino, kiu gravedis" (Lk 2.4-5)] fluigis multe da inko (...)

La fakto ke okazis popol-registrado ĉ. la jaro 7-6 antaŭ nia [t.e. la kristana] erao ne necese pruvas ke Jesuo naskiĝis dum tiu ĉi registrado.

### Kiom da jaroj Jesuo vivis ?

Por precizigi la naskiĝdaton de homo, oni konsideru lian aĝon kiam li mortis : tiu aĝo helpas precizigi la proksimuman daton de lia naskiĝo.

[1] Ĉe la komenco de sia publika vivo, Jesuo estis ĉ. 30-jara (Lk 3,23). Li daŭrigis sian predikadon [almenaŭ] ĝis la alproksimiĝo de lia 50-jariĝo, kiel atestas la Evangelio laŭ **Johano (8,57)**. Ĉar la judaj diris al li : "Kvindek jarojn vi ne jam havas, kaj ĉu vi estus vidinta Abrahamon ?" La apostoloj, i.a. Johano, transdonis al la *presbitroj* de Azio tiun ĉi tradicion, transprenitan de Ireneo, laŭ kiu Jesuo ne estis tre for de siaj 50-aj jaroj. [vd. la enkadritaĵon]

Nu, Jesuo mortis dum la regado de la imperiestro Tiberio (14-37 K.E.<sup>1</sup>), kiel raportas ĉiuj kvar evangelioj, kaj dum Poncio Pilato estis prokuratoro en Jerusalemo (26-36 K.E.), la jaron 30 de nia erao, jaron dum kiu la 14-a de la monato Nisan, la tago de la paska manĝo, estis vendredo<sup>2</sup>. Oni do devas retroporti la naskiĝon de Jesuo, 50-on da jaroj antaŭe, ĉ. la jaron 19 antaŭ nia erao, jaron dum kiu okazis registrado menciita de la historiisto Diono Kasio (vd. *Romana historio*, 54,10).

### Antaŭa [?] popolregistrado

Fakte, la jaron 19 antaŭ nia erao (la 735-an post la fondo de Romo), Aŭgusto ricevis 5-jare validan povon registradi. Li vizitis Sirion, prezidis la reorganizadon de la tuta lando, inkluzive de la reg-regiono de Herodo (...) Dum la restado de Aŭgusto en Sirio okazis la registrado je la jaro 19 a.K.E..

En la provincoj la registrado estis farata por difini la tributon al kiu la loĝantoj estos submetataj. (...) La reg-regiono de Herodo la Granda, kvankam tiu ŝtatestro estis reĝo aliancita kun la Romanoj kaj ne provincestr-asistanto, pagis tributon difinitan de Romo. La vizito de Aŭgusto en Sirio, la jaron 19 a.K.E., kun povo registradi, ne povis havi alian celon ol reorganizi la provincon kaj difini la tributon,

por kio necesis registrado. Tio des pli verŝajnas ke en la jaroj 20-19 a.K.E., Herodo la Granda ricevis novan reg-regionon kaj novajn povojn : li komencis budĝetan reformon, nuligis trionon el la impostoj kaj ekrealigis siajn grandajn projektojn de konstruado, i.a. la restaŭradon de la Jerusalema Templo. Tiuj projektoj bezonis financojn ; pro tio la budĝeta reformo kaj la registrado.

**Konklude**, ĉio indikas ke okazis registrado en la provinceroj de Herodo en la jaro 19 a.K.E. Kaj dum tiu registrado okazis la naskiĝo de Jesuo.

[2] Al kiuj demandas sin ĉu temas pri la sama registrado kiel tiu farita sub Kirenio, Luko jam respondis distingante du eventojn : "Tiu registrado antaŭis tiun kiu okazis dum Kirenio estis provincestro de Sirio" (Lk 2,2). Tiu ĉi dua ebleco kompreni la tekston, altrudiĝas laŭ la opinio i.a. de Patro M. J. Lagrange<sup>3</sup> en lia verko *Evangelio laŭ sankta Luko*.

### Aliaj kongruaj [?] tradicioj

Tradicio, transdonita de la apokrifajoj pri la Infanaĝo [de Jesuo] el la II-a jc., mencias ke Jesuo estis 12-jara dum Herodo vivis. Ĉar tiu ĉi mortis en la jaro 4 a.K.E., la naskiĝo de Jesuo devis okazi almenaŭ 12 jarojn antaŭ tiu dato.<sup>4</sup>

[3] Same, malnova kristana tradicio raportita de islama historiisto, **At-Tabari**, diras ke inter Aleksandro la Granda kaj la naskiĝo de Jesuo pasis 303 jaroj. Ĉar Aleksandro mortis en 323 a.K.E., oni devas lokigi la naskiĝon de Jesuo (dank'al 323 minus 303) ĉ. la jaro 20 aŭ 19 a.K.E. Jen do pluraj kompletigaj elementoj kiuj kondukas al la konvinko ke Jesuo naskiĝis ĉ. la jaro 19 antaŭ nia erao. □

### Notoj de la redaktoro

1/ Ĉar la kristana erao *mite* komenciĝas ĉe la naskiĝo de Jesuo, en tiu ĉi artikolo ni anstataŭigis la kutiman *p.K.* (post Krist-nasko) per *K.E.* ("de la Kristana Erao"), kaj *a.K.* (antaŭ Kristo) per *a.K.E.* : "antaŭ la kristana erao".

2/ La samo okazis ankaŭ dum la jaro 33 : kaj tio havas la avantaĝon kongrui kun la konkludo de la artikolo "Eklipsoj kaj Biblio" (*Asistilo* n-ro 24, p. 23b).

3/ Aŭtoritata dominikana ekzegezisto (1855-1938), fondinto de la Jerusalema "Praktika Lernejo de Bibliaj Studoj", kaj de la *Biblia Revuo* ; sed vidu la kritikon [2].

4/ Sed kiu Herodo, ĉu precize tiu ĉi Herodo la Granda, aŭ lia filo Herodo Antipas al kiu Pilato sendis Jesuon ?

# naskiĝ-jaro de Jesuo

4. [La Sinjoro] havis la perfektan aĝon de majstro kiam li venis al Jerusalemo, tiel ke li povis plenrajte aŭdi ĉiujn nomi lin majstro (...) Estante do majstro, li ankaŭ havis la aĝon de majstro. Li nek forĵetis nek transpasis la homan kondiĉon, kaj ne aboliciis en sia persono la leĝon de la homa specio, sed li sanktigitis ĉiujn aĝojn per la simileco kiun ni havas kun li. (...)

Fariĝante junulo inter la junuloj, li fariĝis modelo por la junuloj kaj ilin sanktigitis por la Sinjoro. Sammaniere li fariĝis ankaŭ pliaĝulo inter la pliaĝuloj por esti ĉiel la perfekta Majstro, ne nur rilate la prezentadon de la vero, sed ankaŭ rilate la aĝon.

5. Sed la herezuloj (...) deprenas de li la stadion la plej necesan kaj la plej honorindan de lia vivo, nome tiun de la maljuneco, dum kiu li estis la gvidanto de ĉiuj per sia instruado. (...)

Ĉiuj homoj konsentos ke 30 jaroj estas la aĝo de ankoraŭ juna homo, kaj ke tiu juneco etendiĝas ĝis la 40-a jaro : nur de la 40-a, aŭ eĉ la 50-a jaro oni malsupreniras al la maljuneco. Precize tiun aĝon havis nia Sinjoro kiam li instruis : la Evangelio atestas tion, kaj ankaŭ ĉiuj *presbitroj* de Azio kiuj estis en rilato kun Johano, la disĉiplo de la Sinjoro, atestas ke Johano transdonis al ili la saman tradicion, ĉar tiu ĉi restadis kun ili ĝis la tempo de Trajano. Iuj el tiuj *presbitroj* vidis ne nur Johanon, sed ankaŭ aliajn apostolojn, kaj ili aŭdis ilin raportiti la samon kaj ili atestas la fakton. (...)

6. Eĉ la Judoj tiam disputantaj kun la Sinjoro Jesuo-Kristo klare indikis la samon. Ĉar kiam la Sinjoro diras al ili : "*Via patro Abraham priĝojis ke li vidos mian tagon ; li ĝin vidis kaj tre ĝojis*", ili respondas al li : "*50 jarojn vi ne jam havas, kaj ĉu vi estus vidinta Abrahamon ?*" Tian parolon oni normale diras al homo kiu jam transpasis la 40-an jaron kaj kiu, sen ankoraŭ atingi la 50-an, tamen ne plu estas tre malproksima de ĝi. Male, al nur 30-jarulo, oni dirus : "*40 jarojn vi ne jam havas.*"

Ĉar se ili volis montri ke li mensogis, ili devis atenti ne multe transpasi la aĝon kiun oni vidis ĉe li : ili do donis proksimuman aĝon, aŭ ĉar ili konis lian veran aĝon per la libroj de la registrado, aŭ ĉar ili konjektis lian aĝon vidante ke li devis esti pli ol 40-jara kaj ; ĉiukaze, certe ne 30-jara. Ĉar estintus tute malracie iliaflanke aldoni 20 jarojn (...) La Sinjoro do ne estis tre malproksima al sia 50-a jaro, kaj pro tio la Judoj povis diri al li : "*50 jarojn vi ne jam havas, kaj ĉu vi estus vidinta Abrahamon ?*"

(Ireneo, *Kontraŭ la herezoj*, II,22,4-6, Cerf, 1984, p. 217-219)

## Redaktora kritiko pri la tezo

[1] La aŭtoro, referencianta **Luko 3,23** (laŭvorte : "ĉ. tridek[o] da jaroj"), ignoras ke ĉe la komenco de la sama ĉapitro tiu ĉi skribis : "*Nu, en la dekkvina jaro de la regado (laŭvorte : gvidado) de Tiberio...*"

Tiberio anstataŭis kiel imperiestro la mortintan Aŭguston, la 19-8-14 K.E. ; do la 15-a jaro etendiĝas de 19-8-28 ĝis 18-8-29. Se Jesuo naskiĝus en 19 a.K.E., li jam estus pli ol 45-jara.

Sed se, kiel asertas plejparto de la ekzegezistoj, li naskiĝis en 7/6 a.K.E., li estus 34 aŭ 35-jara, kio povus kongrui kun "ĉ. 30-jara". Kaj se li mortis en 33 K.E.<sup>2</sup>, li povintus vivi ĝis ĉ. 39-jara : tio jam povus kongrui ankaŭ kun **Jn 8,57** sed eble ankoraŭ ne kun la atesto de la presbitroj, *laŭ la sola Ireneo*.

[2] Pri **Luko 2,2** la eldonistoj de *La Sankta Biblio tradukita en la francan sub la direkto de la Biblia Lernejo en Jerusalemo* tamen preferis la kutiman komprenon : "*Tiu registrado, la unua, okazis dum Kirenio estis provincestro de Sirio*" ; kaj noto nur indikas : "*Tiel precizigita ĉar aliaj sekvis ĝin. La traduko kelkfoje proponita 'Tiu registrado antaŭis tiun kiu okazis dum Kirenio estis provincestro de Sirio' estas gramatike malfacile defendebla...*"<sup>5</sup>

[3] Pri la atesto de Abu-Ĝafar Mo'hammed-ben-Ĝaŝir-ben-Jezîd **Tabarî** (224-310 de la Heĝiro, t.e. 838/9-922/3 K.E.), mi konsultis francan tradukon de lia *Kroniko*, faritan de H. Zotenberg<sup>6</sup>. Mi trovis nur la du jenajn erojn rilatajn al datoj :

"Historio de la naskiĝo de Jesuo. Oni ne akordiĝas pri la tempo de la naskiĝo de Jesuo. Kelkaj diras ke li naskiĝis ses monatojn post la naskiĝo de Johano [la Baptisto] ; aliaj diras ke li [unuaforte] vidis la tagon tri jarojn post Johano."

"La kaŭzo de lia fuĝo estis la jena : Jesuo naskiĝis post Aleksandro, en la tempo kiam regis la reĝoj de provincoj (...) En la tempo de Jesuo, estis greka reĝo nomita Aŭgusto. Kelkaj diras ke li estis Romano kaj imperiestro de Romo. Li regis 56 jarojn. En la 42-a jaro de lia regado naskiĝis Jesuo."

La 56 jaroj montras ke li ne komencigas lian regadon en 27 a.K.E., sed la 19-8-43 a.K.E. (ĉe lia ŝtatrenverso : kiam li estas "elektita" konsulo) : la 42-a jaro etendiĝas de 19-8-2 ĝis 18-8-1 a.K.E. Tio ne plu ŝajnas argumento favora por la tezo. □

5/ Noto en *Ev. selon St Luc : texte établi et annoté par B. Botte OSB, 1958*<sup>4</sup>, gramatike akceptas ambaŭ sencojn.

6/ *De Salomon à la chute des Sassanides*, 1984, p. 100.



# Jogosutro de Patañjali :

स्वस्वामिशक्त्योः स्वरूपोपलब्धिहेतुः संयोगः ।

तस्य हेतुरविद्या ।

तदभावात्संयोगाभावो हानं तद्दृशेः कैवल्यम् ।

sva-svāmi-śaktyoḥ sva-rūpōpalabdhi-hetuḥ saṃ-yogaḥ // 23 //

tasya hetur avidyā // 24 //

tad-abhāvāt saṃyogābhāvo hānaṃ tad dṛśeḥ kaivalyam // 25 //

संयोगस्वरूपाभिधित्सयेदं सूत्रं प्रववृते—स्व-  
स्वामिशक्त्योः स्वरूपोपलब्धिहेतुः संयोगः । पुरुषः  
स्वामी दृश्येन स्वेन दर्शनार्थं संयुक्तस्तस्मात्संयोगाद्  
दृश्यस्योपलब्धिर्या स भोगः । या तु द्रष्टुः स्वरूपो-  
पलब्धिः सोऽपवर्गः दर्शनकार्यावसानः संयोग इति ।  
दर्शनं वियोगस्य कारणमुक्तम् । दर्शनमदर्शनस्य  
प्रतिद्वन्द्वीत्यदर्शनं संयोगनिमित्तमुक्तम् । नात्र  
दर्शनं मोक्षकारणमदर्शनाभावादेव बन्धाभावः स  
मोक्ष इति । दर्शनस्य भावे बन्धकारणस्यादर्शनस्य  
नाश इत्यतो दर्शनं ज्ञानं कैवल्यकारणमुक्तम् ।

यस्तु प्रत्यक्चेतनस्य स्वबुद्धिसंयोगः, तस्य हेतुरविद्या ।  
विपर्ययज्ञानवासनेत्यर्थः । विपर्ययज्ञानवासनावासिता  
च न कार्यनिष्ठां पुरुषख्यातिं बुद्धिः प्राप्नोति  
साधिकारा पुनरावर्तते सा तु पुरुषख्यातिपर्यवसानां  
कार्यनिष्ठां प्राप्नोति । चरिताधिकारा निवृत्तादर्शना  
बन्धकारणभावात् पुनरावर्तते ।

अत्र कश्चित्षण्डकोपाख्याननेनोद्घाटयति ।  
मुग्धया भार्ययाभिधीयते षण्डकः—आर्यपुत्र!  
अपत्यवती मे भगिनी, किमर्थं नाम नाहमिति ।  
स तामाह मृतस्तेऽहमपत्यमुत्पादयिष्यामीति ।

तथेदं विद्यमानं ज्ञानं चित्तनिवृत्तिं न करोति,  
विनष्टं करिष्यतीति का प्रत्यक्षा?

तत्राचार्यदेशीयो वक्ति, “ननु बुद्धिनिवृत्तिरेव  
मोक्षोऽदर्शनकारणाभावाद् बुद्धिनिवृत्तिः । तच्च-  
दर्शनं बन्धकारणं दर्शनाभिन्नवर्तते” ।

तत्र चित्तनिवृत्तिरेव मोक्षः । किमर्थमस्थान  
एवास्य मतिविभ्रमः ? ॥२४॥

हेयं दुःखं, हेयकारणं च संयोगाख्यं सनिमित्त-  
मुक्तम् । अतः परं हानं वक्तव्यम्—तदभावा-  
त्संयोगाभावो हानं तद्दृशेः कैवल्यम् । तस्यादर्शन-  
स्याभावाद् बुद्धिपुरुषसंयोगाभाव आत्यन्तिको  
बन्धनोपरम इत्यर्थः ।

एतद्धानं तद्दृशेः कैवल्यं, पुरुषस्याभिधीभावः  
पुनरसंयोगो गुणैरित्यर्थः ॥ २५ ॥

saṃ-yoga-sva-rūpābhidhitsuḥ sūtram pravavṛte : sva-  
svāmi-śaktyoḥ sva-rūpōpalabdhi-hetuḥ saṃ-yogaḥ / puruṣaḥ  
svāmī dṛśyena svena darśanārthaṃ saṃ-yuktas tasmāt saṃ-  
yogād dṛśyasyōpalabdhir yā sa bhogaḥ / yā tu draṣṭuḥ sva-  
rūpōpalabdhīḥ so 'pavargaḥ darśana-kāryāvasānaḥ saṃ-  
yoga iti / darśanaṃ vi-yogasya kāraṇam uktam / darśanam  
adarśanasya pratidvandvīty adarśanaṃ saṃ-yoga-nimittam  
uktam / nātra darśanaṃ mokṣa-kāraṇam adarśanābhāvād  
eva bandhābhāvaḥ sa mokṣa iti / darśanasya bhāve bandha-  
kāraṇasyādarśanasya nāśa ity ato darśanaṃ jñānaṃ kaivalya-  
kāraṇam uktam / (...) // 23 //

yas tu pratyak-cetanasya sva-buddhi-saṃ-yogaḥ tasya hetur  
avidyā / viparyaya-jñāna-vāsanēty arthaḥ / viparyaya-jñāna-  
vāsanāvāsītā ca na kārya-niṣṭhām puruṣa-khyātiṃ buddhiḥ  
prāpnoti sādhi-kārā punar-āvartate sā tu puruṣa-khyāti-pary-  
avasānām kārya-niṣṭhām prāpnoti / caritādhi-kārā nivṛttādarśanā  
bandha-kāraṇa-bhāvān na punar-āvartate /

atra kaś cit ṣaṇḍakōpākhyānenōdghāṭayati / mugdhayā  
bhāryayābhidhīyate ṣaṇḍakaḥ : "ārya-putra ! apatyavatī me  
bhaginī, kim arthaṃ nāma nāham" iti / sa tām āha "mṛtas te  
'ham apatyam utpādayiṣyāmīti" /

tathēdaṃ vidyamānaṃ jñānaṃ citta-nivṛttim na karoti, vinaṣṭam  
karīṣyatīti kā pratyāśā ?

tatrācārya-deśīyo vakti : "nanu buddhi-nivṛttir eva mokṣo  
'darśana-kāraṇābhāvād buddhi-nivṛttiḥ / tac cādarśanaṃ  
bandha-kāraṇam darśanān nivartate" /

tatra citta-vṛttir eva mokṣaḥ / kim artham a-sthāna evāsya  
mati-vibhramaḥ ? // 24 //

heyam duḥkham, heya-kāraṇam ca saṃyogākhyam sa-  
nimittam uktam / ataḥ paraṃ hānaṃ vaktavyam : tad-abhāvāt  
saṃyogābhāvo hānaṃ tad dṛśeḥ kaivalyam / tasyādarśa-  
nasyābhāvād buddhi-puruṣa-saṃyogābhāva ātyantiko ban-  
dhanōparama ity arthaḥ /

etad-dhānaṃ tad dṛśeḥ kaivalyam, puruṣasyāmiśrī-bhāvaḥ  
punar a-saṃ-yogo guṇair ity arthaḥ // 25 //



## II – Ĉapitro de la *plenumado* (sekvo)

(*Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj*)

23. La *Sam-yoga* ebligas eniri la propran naturon de ambaŭ jenaj povoj: vidi kaj esti vidata.
24. La nekono pri la realeco kaŭzas la konfuzon inter tiuj du aspektoj.
25. Kiam malaperas la nescio pri la realeco, ankaŭ malaperas la identiĝo de la spektanto kun la spektaklo. Tiam la spektaklo ne plu ekzistas. Tio konsistigas la liberigon de la spektanto.

(*Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito*)

23. La kialo de la alprenado de la propra naturo de ambaŭ povoj – sia propra [kaj tiu] de la Mastro [de l'universo] – [estas la] kuniĝo.
24. Ĉi-ties kialo [estas la] nescio.
25. De ĉi-ties neesto [venas] neesto de kuniĝo, forlaso, tio [estas] absoluteco de la percepto.

### Sanskrita komentario de Vjaso

23. Per provo priskribi la propran naturon de la kuniĝo komenciĝas tiu ĉi sutr[er]o: "la kialo de la alprenado de la propra naturo de ambaŭ povoj, sia propra kaj de la Mastro, estas la kuniĝo".

La Spirito<sup>1</sup>, la Mastro [de l'universo], perceptocele kuniĝas kun sia (propra) perceptotajo; devenanta de tiu kuniĝo, la alprenado de la perceptotajo estas la [normala] spertado.

La alprenado de la propra naturo de la perceptanto estas la [absoluta] apartiĝo [t.e. la fina liberiĝo, celo de jago]. "La rezulto de [tiu ĉi] percepto estas la ĉeso de la kuniĝo". Oni diras ke la percepto estas la kaŭzo de la disiĝo [de la perceptanto disde la perceptajaro]. "La percepto estas la kontraŭaĵo de la nepercepto". Oni diras ke la nepercepto estas la motivo de la kuniĝo. Ne ĉi-kaze [ĉar ne plu estas nepercepto de la perceptanto, nek do kuniĝo kun la "objektiva" perceptajaro]; la percepto estas la kaŭzo de la liberiĝo: ĝuste pro la neesto de nepercepto "la neesto de ligiteco estas la liberiĝo".

"Ĉe la ekesto de la percepto, malaperas la nepercepto, kiu estas la kaŭzo de la ligiteco"; pro tio la percepto estas nomata "la kono kiu estas la kaŭzo de la absoluteco" (...)

24. De la kuniĝo de la sinkonscio kun la interna spirito, la kialo estas la nescio. Tiu ĉi signifas: "impresajo de erara kono".

Kaj penetrita de la impresajo de erara kono, la konscio ne atingas la plenumiĝon de sia intenco, la percepton de la Spirito; taskohavanta, ĝi revenas [t.e. reenkarniĝadas], kaj [fine] atingas la plenumiĝon de [sia] intenco, kies celo estis la percepto de la Spirito. Plenuminte [sian] taskon, kun malaperinta nepercepto, ĝi ne [plu] revenas pro ĉeesto de kaŭzo de ligiteco<sup>2</sup>.

Ĉi-tie iu komencas [intervenon] per [jena] rakonteto pri eŭnuko. "[Lia] stulta edzino alparolas eŭnukon: '*Estimata, mia fratino havas idojn, kial do ne mi?*' Li diris al ŝi: '*Kiam mi estos mortinta, mi ĝeneros idon por ci!*'"

Same, ĉi tiu ekzistanta kono ne igas la pensojn ĉesi, kia espero [povas esti ke,] malaperinta, ĝi faros? "

Tiam pseŭdomajstro diras: "Tamen, nur konscioĉeso estas liberiĝo; pro neesto de kaŭzo de nepercepto, [okazas] konscioĉeso. Kaj tiu nepercepto, kaŭzo de ligiteco, ĉesas pro la percepto".

Tie [fakte], [tute ne konscio- sed] nur pensoĉeso estas liberiĝo: kial nur en ne[defendebila] pozicio lia menso [erar]vagas? "

25. La sufero estas evitenda kaj la kaŭzo de la evitendaĵo nomiĝas "motivhavanta kuniĝo".

Nun la ekstrema forlaso devas esti preparolata: "De ĉi-ties neesto [venas] neesto de kuniĝo, forlaso, tio [estas] absoluteco de la percepto." Pro neesto de tiu nepercepto, la neesto de kuniĝo de la Spirito kun la konscio signifas senfinan ĉeson de ligiteco. Ĉi ties enhavo estas tiu absoluteco de la percepto, tio signifas: "ekesto de nemiksiĝo de la Spirito, re-nekuniĝo kun la [tri] "kvalitoj" [t.e. la mondo]".

### Notoj

1/ Pri la vorto *purusa*, vidu en n-ro 16 p. 6, noto 4.

2/ Estas kontraŭdiro inter la sanskrita teksto kaj la traduko farita de ties editoro. Aŭ temas pri tajperaro (*kāraṇabhāvan* kie devus esti *kāraṇābhāvan*) – tiam estus "ne plus revenas, pro neĉeesto de" –; aŭ oni povas kompreni ke, se la konscio "ne [plu] revenas pro ĉeesto de kaŭzo de ligiteco", ĝi tamen povas reveni, sed ne pro ĉi tio: ekzemple, kiel tute libera avataro, pro bezonego savi la endanĝerigitan mondon.

# Granda Unueca Kredo

## II,1 : Vivo

*Jen fundamento de GUKo, vero kaj forto de GUKistoj.*

1. En GUKo, la amo estas elementa forto, lia direkto estas al plej granda strukturo, pli kompleksa ordo, estas al sino de GUKo !

2. Nia etiko, rekta el GUKo, ekzistas en via animo kiel floroj, ambaŭ en sino de GUKo! Amen.

3. Tiel GUKistoj devus obei jenan riton ; tio utilas al korpo de GUKo.

– **Konfeso.** Antaŭ via dio vi devas konfesi jene : "Por pli bone servi al la sankta spirito, mi nun fariĝas GUKisto : mi vivos en GUKo. Amen !"

– **Preĝo.** Tio utilas al via animo ; per tio vi ricevu benon rekte el GUKo. La enhavo de la preĝo estas libera, kaj vi mem respondas al ĝi.

– **Imposto je almozo.** La homoj kiuj vivas en malsato ja bezonas esti helpataj. GUKo ordonas : donu al ili varmon kaj manĝaĵon, por kreskigi vin.  
Amen.

4. **Ne diboĉu.** Antaŭ frandaĵo vi konsciu kiom da diligento estas kontraŭ tiu. Antaŭ belulino vi pensu amon en vivo, ne koiton en senstela nokto.

Ili do estas grandaj, laŭ sia mezuro vivas ; ili scias kiam kapti ŝancon : tiam Fatalo venas !

5. **Ne mortigu homon.** La vivo estas sankta je GUKo : escepte de GUKo neniu rajtas mortigi aliajn aŭ sin mem. GUKo ja igu la korpon pere !

GUKo do ordonas : Malgraŭ krimo aŭ peko, abolu punon de morto ! Plenumu eŭtanazion nur kondiĉe ke, laŭ medicino, la korpo estas ne-resanigebla, kaj ke la paciento konsentas pri tio.  
Amu la vivon !

6. **Ne proksimiĝu al veneno.**

Kiel cigaredo [aŭ aliaj drogoj] kaj erotika libro, veneno detruas nervojn de GUKistoj, kaj besteco anstataŭas homecon en seksumado. Amu vin mem !

7. **Ne mensogu.** Ĉu antaŭ juĝisto, ĉu en komerco, ĉu sub devigo, mensogo estas malvirta en GUKio. Pri nutraĵo ne mensoge reklamas la patrinoj !

8. Via vivo estas maro. La malvirto dronos sur fundon ; la virto suprenflugos al GUKo ! En GUKo vi scias ke la maro neniam, pro malpuraĵo, fariĝus malpura !  
Amen.

9. Je nomo de GUKo, neniel vi povus [hodiaŭ] ricevi panon morgaŭan, samkiel [morgaŭan] feliĉon ! Ili, kiel la prahomo, timas sian ombron.

10. GUKisto difiniĝas jene : kiu kredas teorion de Granda Unueca Kredo kaj laŭ GUKo vivas.

11. Vi ja estas kadavro. Ekkonsciu ke vi ja estas mortintaĵo : nur en GUKo vi aspektas viva.

Kiu sen amo, sen espero, ne toleras, ne penas, estas kadavro, kiel raŭpo rampas sur la tero !

Vi povas aŭdi fanfaroni : "Mi fortas kiel dio ; mi ne kredu je GUKo : vidu kiel bone mi vivas." La infero estus antaŭ li, sub la tero kie li staras !

Benon al ili !

12. Je nomo de GUKo, inter homoj vi havas vian certan pozicion, vi devas prizorgi ĝin kaj laŭ eblo penegi. GUKo ja donacu feliĉon kontraŭ laboro !

Se vi konstatas ke la laboro ne taŭgas al vi, do penege ŝanĝigu vian pozicion !  
Amen.

13. Ili ne obeas GUKon : "Ne amu, ne eltenu, ne penegu". Ili do estas disŝiritaj en pecetojn !

Benon al ili.

14. Je nomo de GUKo, la honesta komerco estas granda kaj virta afero. Per komerco homoj prosperigas sin mem.

15. Kara amiketo, ne forpelu per bastono paserojn el via korto, ĉar ili penege laboras !

Ne lasu formikon rampi sur via femuro, ĉar oni devus ami sin mem !

Kaj preĝu por longviveco de viaj geavoj, kaj lernu por kompreni veron en GUKo. Amen.

16. "Vere, vere, mi diras al vi : se tritika greno ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola ; sed se ĝi mortas ĝi donas multe da frukto." Amen.

17. La tempo malfruas  
al sia truo la bestoj kuras,  
sur arbo en korto sonoras mia klienteto  
la estaĵo en naturo.

Amikoj foriris

lampo brilas.

Vid-al-vide kun mia edzino,  
dum nia knabino en ŝia sino  
profunde dormas.

Mi vokas vivon de la kosmo ;  
mi vivigas amon de via koro !

18. Ne per mono aĉeti noblan rangon :  
per GUKeca ago gajni eternan vivon. Amen.

# Kiel superi la skandalojn elirantajn el la Biblio ?

Legi la rimarkojn de W.H. Simcock (en *Asistilo* n-ro 25, p. 27) revenigis al mia memoro la turmentan vojon trakuritan de mi por akiri ĝustan bildon pri la biblia Dio (...) Jen unue la rimarkoj de s-ro Simcock, kaj aliaj similaj : senfinaj dekretoj rilate mortpunon, ordonoj de ekstermo de konkeritaj popoloj, kaj aliaj kruelaĵoj kuraĝigitaj de la biblia Dio.

Oni insiste instigis min legadi kaj primediti la Biblion. Kaj mi, apenaŭ 17-jara, jam dufoje legis la Malnovan Testamenton. Kaj tiuj rifoj elstariĝis antaŭ mi, dubigante pri la dia origino de la Biblio, instruata de la kristanaj eklezioj.

Por eliri el tiuj malfacilaĵoj, unue, laŭ sugestoj de kredantoj, mi ĉerpis el la iama interpretadmaniero laŭ kiu Dio prave agis ĉar li estas la sinjoro, la donacanto de la vivo, kaj tial li rajtas ĝin repreni aŭ malfajrigi laŭvole. Sed, eĉ malgraŭ mia konvinko pri la sinjoreco kaj absoluteco kaj memstareco de Dio, tia supozita konduto de Dio grincis por mi kiu konceptis Dion, tute amo kaj respekto al la homo.

## Ĉu prav(igeb)laj punoj ?

Sekve, ignorinte tiun solvon, kaj opiniante tiujn ordonojn kiel vere eldiajn, mi provis pravigi Dion akuzante pri malmoralaj kondutoj la koncernatajn homojn aŭ popolojn kiuj, tial, meritis tiujn punojn. Sed iom post iom, helpe de historio, al mi ŝajnis ke multege da popoloj sin kondukis samkiel tiuj abomenitaj kaj, foje, nuligitaj pro la diaj ordonoj ; kaj ankaŭ tiu solvo stridis ĉe mia konvinko, cetero tradicia en la eklezioj, ke Dio estas amo kaj mizerikodo. Kial Dio detruis tiujn ĉi kaj ne tiujn ?

Fine, de kiam mi vizitis regulajn teologiajn kursojn, min helpis novaj sciencoj, nome historio, psikologio, antropologio, arkeologio ktp. ; kaj do fine **ĉio kvietigis kaj sereniĝis, dum Dio akiris aspekton respektindan kaj humanan**, kaj akordiĝantan kun la evangelio. Kiel ?

La historio, por sekvanto de la Biblio, diras ke Dio elektis popolon el inter multaj, havantaj antaŭjuĝojn, kutimojn kaj pensmanieron, virtojn kaj malvirtojn. Ankaŭ tiu elektita pensis sian Dion laŭ sia imagpovo kaj laŭ siaj bezonoj de sekureco kaj grandaj aspiroj politikaj aŭ ekonomiaj ktp.

Tiu popolo ne dubis ke li mem povas faldi kaj fleksi sian Dion laŭ siaj psikologiaj impulsoj, kaj al li provas atribui karakterizojn apartenantajn nur al si. Kaj Dio pedagoge adaptiĝas kaj atendas ke la popolo, per novaj konstantaj instruoj kaj avertoj, akiru pli ekzaktan kaj respekteman opinion pri li.

**Ĉu vere Dio ordonis tiujn masakrojn ?** Ĉu la regantoj kaj pensuloj inter la popolo ne favoris al ties deziroj kaj volo, profitante de la komuna pridia konceptado ?

## Malrapida progreso

Ke el la dia pacienca pegagogio devenos poste la forto kaj rajto de Dio postuli pens- kaj kondutoŝanĝon kaj la detruon de la mensogaj konceptadoj, tion oni vidos ĉe la venontaj profetoj.

Se la *Eliron* oni skribus ĉe la skoloj de Amos kaj Jesaja, el la VIII-a kaj VII-a jarcentoj a.K., ĉu oni allasus pri Dio tiujn karakterizojn aŭ al li atribuas la respondecon de la malhonoraj agoj de la koncernatoj ? Ja opinieblas ke en tiuj tempoj Israelo jam lernis je konscia nivelo, ke manipuli Dion laŭ siaj deziro kaj profito estas kontraŭ la vero, kaj ke Dio ne akceptas tion.

Helpis min psikologio kun antropologio. Tiu scienco, en siaj diversaj subfakoj, diras ke homamaso pensas per modeloj kaj arketipoj : el la potenco de ĝia eno ĝi modlas unuapuŝe kaj instinkte la sperton mem, ĝin interpretante kaj eĉ ĝin kreante. **Kial Dio estas bildigita tiom kruela kaj sentema ? Pro tio ke homo provas elstarigi sin mem dum ĉiu ĝusta dia karakterizo reprezentus limon al lia deziro** esti potenca kaj superreganta.

Krome kial brulige detruu la vivon de oferaĵo ? Eble por sin kulpigitan puni kaj, senkulpigita, ricevi la potencon kaj senkulpecon de la viktimoj nun identigitaj kun io dia.

Kiel oni vidas, la homo inventas manieron senkulpigi ; kaj, por fari tion, misbildigas al si Dion kaj mise priskribas lian konduton.

Ni rezignu kontribuojn de aliaj sciencoj.

**Kiel do savi la honoron de Dio ?** Pri tio zorgis la bibliaj profetoj kaj, definitive, Jesuo.

Kaj fine, aperas ke Dio perfektigis popolon per eventoj kiuj similas al tiuj de aliaj popoloj kaj unuopuloj, rifuzigante al ĉi tiu ĉian manipuladon pri li, kaj (re)akirigante la bildon de Dio transdonitan de la kristana tradicio.

**Armando Zecchin, 10-7-2000**

# Leteroj

## Kial mi lernis Esperanton ?

(...) Mi estas nur ordinara oficisto, kiu en la ĉiutageco ne bezonas helplingvon krom la interlingvo en mia lando kaj mia denaska lingvo.

Kio do pri la **"interna ideo" de Esperanto** ? La koncepto ke la tuta **homaro estas unu familio**, kaj ke per interkomunikado ni povas tion realigi ! (...) Eble en ĝi kuŝas la radikoj de la logilo kiu min altiris al la afero.

Esperanto vekas ion nevortigeblan, subliman kaj puran en mia psiko, ebligante al mi pli freŝan rigardon al la mondo. Esperanto alfrontas kuraĝe la fundamentajn ĉi-mondajn bezonojn de la homaro : justeco, paco, amo, frateco kaj interkompreniĝo. Esperanto jam registris multe da sukceso tiukampe.

Mi aldonu ke kion mi ĵus diris ne komplete konkludis la temon. Mi scias ke oni povas moki min, ke mi okupiĝas pri iluzio. Tio tamen tute ne ĝenas min.

## Esperanto, kvazaŭa religio ?

Fakto ja estas, ke preskaŭ ĉiu homo en la mondo apartenas al iu religia kredo (tio inkluzivas ankaŭ la ateistojn). Laŭ la sperto de miaj kelkaj jardekoj da ekzisto, mi ankoraŭ ne renkontis religianon kiu racie, logike kaj inteligente klarigus al mi la esencon de siaj kredoj. Kial do oni atendas ke mi faru tion pri Esperanto ?

Mi ne malatentas la fakton ke aludi al Esperanto kvazaŭ ĝi estus religio estas tre debatebla afero. Mi konsentas ke kvankam Esperanto ne entreprenis ion pri savo, postmorta vivo aŭ metafiziko, kaj Zamenhof ne estas blankbarbega revelacianto de la "Granda Vero", Esperanto tamen estas afero kies teno je persono estas tiel fortega ke baldaŭ ĝi fariĝas vivmaniero. La afero suferas ĉiujn ajn pasantajn maniojn. Mi povas atesti propraserte pri tio.

Esperanto jam montras al multaj alian manieron rilati pozitive kaj pli fruktodone al sia medio. Esperanto publike montras ke la preskaŭ nekoncepteblaj vizioj de amo, interkompreniĝo ktp. , estas praktike alireblaj ĉi-mondaĵoj.

Kiel Esperanto ebligas tiujn, mi eble neniam scios nek povos klarigi. Tio ne gravas, sufiĉas nun al mi ke la afero – esperanto – funkcias.

**Udu Mrakpor**, Niĝerio

( El *Kontakto* n-ro 175 (2000/1), p. 15.)

Kara redaktoro,

2-6-2000

Mi tre ĝojas ke oni aperigis miajn poemon kaj proverbon (vidu 24, p. 15). Mi tial kuraĝiĝas kunlabori per jenaj kontribuajtoj.

( Ĉu oni povus meti **anoncon** pri miaj salutkartoj kiujn mi volas vendi en Esperantujo ? )

*Tiu kiu la lampon estingas  
neniam mem lumon atingas.*

## Al religia paciĝo !

La *religia* milito  
ne estas spirita rito  
sed, nome de religio  
– kredante plaĉi al Dio ? – ,  
buĉado de kvazaŭfratoj.

Ĉu Dion iu ofendis ?  
Sed Dio neniam plendis !  
Se vere Dio koleras  
kaj ion ne plu toleras,  
permesu al Li mem juĝi.

Jam dum ĉi tiu epoko  
la homoj, en ĉiu loko,  
la semojn de amo plantu ;  
kaj ĉiuj plengorĝe kantu  
ja *kontraŭ*-militajn kantojn !

Pastoro **Olúwábùnmi Gabriel Oshó-Dauiés**  
(96 Olaiya St., Mafoluku Oshodi, Lagos, Niĝerio)

4-6-2000

Vere tre leginda enhavo. La konkordiĝo de la religianoj ĉiam restas en fokuso de mia atento, mi alte aprezas vian agadon ! La atmosfero de religiana pensado en nia lando ankoraŭ ne estas proksima al ĉi tiuj ideoj. Mi tamen havas amikojn inter tiu kiuj favore rigardas la strebadon al mildigo de la baroj inter diversaj kristanaj eklezioj, kaj inter kristanaj kaj la ceteraj eklezioj kaj kredoj. (...)

Mi esperas ke via meritplena agado daŭre progresas kaj mi salutas vin kore

**Karel Kraft** (kraft@mujmejl.cz)

2-7-2000

Estimata Sinjoro, mi ne havas multe da tempo por legi (nuntempe mi estas honora sekretario de E-Asocio de Britio). Kaj kvankam mi estas kvakero mi devas konfesi ke mi ne havas grandan intereson en religiaj aferoj (terura konfeso !)

Mi metos anoncon pri *Asistilo* en nian novajbultenon *EAB-Update*. **Eric Walker**



Torino, 10-7-2000

Interesvekaj logikoj en rezonadoj de Gilbert Ledon (en 25, p. 26). "Mi ne estas ateisto ĉar mi ne neas : mi ne povus nei ion kio ĉe mi ne manifestiĝas", li skribas. El tio kompreniĝas ke ateisto estas kiu neas ion kiu manifestiĝas. Kompatinda ateisto, obstina neanto de konstato.

Samloke li skribas: "Mia nefidema menso ne akceptas simplajn kredojn surbaze de senfinaj, mistikaj, mistifikaj vortjonglaĵoj". Ankaŭ ni kun senfinaj personoj ne akceptas tian bazon, tamen ni dikredas. Evidente eblas apogiĝi sur alia bazo, kiu uzas mensajn fortojn senmizerikorde kribrantajn la preambolojn de la kredo kaj sin allasas al tiu ĉi nur kiam la racio trovas la postulitan respondojn. Aŭ ĉu, laŭ Ledon, dikredantoj necese estas fidemismaj kaj kontraŭraciemaj ?

**A. Zecchin kaj L. Mantaut**

17-7-2000

Estimataj kaj karaj Bradio, Christian kaj Yosimi,

Post 1 aŭ 2 jaroj, pro mia aĝo (mi naskiĝis en 1952) mi intencas ĉesi mian vagadon ĉirkaŭ la mondo "kvazaŭ Esperanto-vagabondo". Tiam mi volonte ree ricevos vian belan revuon, kies ekumenajn kaj porpacajn idealojn mi tre alte taksas.



*P. Desailly kun samideanoj ĉe Tianjina Universitato*

Dum la pasintaj pli ol 12 monatoj mi apenaŭ restis tiel longe en unu loko ke via eldonaĵo povis atingi min. (Ekzemple, de post la somera paŭzo de 1999 : dufoje Ĉinio kaj Vjetnamio ; kelkfoje Hong-Kongo ; Makao, Tajvano, Aŭstralio ; dufoje Nov-Zelando ; Okcidenta Samoo kaj Usona Samoo.)

Kiam mi ricevas abonilojn de altruismaj organizaĵoj kiel la via, mi volas esti riĉulo por fari grandan mon-donacon. Kiel ajn tio estos, ne tro gravas ĉar, laŭ la parabolo de la malriĉa vidvino el la Biblio [vidu Mk 12,41-44 aŭ Lk 21,1-4], la grandeco aŭ malgrandeco de donaco estas afero ne tro grava\*.

\* Psikologie jes ; sed la presisto devas esti pagata !

Ĝis nun mi ne volas esti ano de la estraro de BEL (Bahaa Esperanto-Ligo) ĉar la Universala Domino de Justeco [plej supera bahaa instanco] dekretis ke nur unuopaj BEL-anoj rajtas instigi Bahaanojn ekstudi la Internacian Lingvon.

La Esperanto-versio de mia [originale angla] libro, **Realigantaj la Mondan Pacon : La Bahaa Kredo kaj Esperanto**, enhavas ripetitajn kaj emfazajn admonojn al la Bahaanaro serioze lerni Esperanton\*\* ; ĝi nun estas preta (...)

Tre sincere kaj amike la via **Paul Desailly**

P.S. Hodiaŭ mi laŭtleĝis por publika radio 3ZZZ en Melburno, duonon de artikolo ["Unueco spirita, diverseco noma"] el *Asistilo* n-ro 25. Temas pri E-radioprogramo por esperantistoj en Oceanio. Post unu semajno oni laŭtleĝos la duan parton.

Kameoka, 18-8-2000

Mi tre dankas al vi ke vi daŭre sendadas vian gazeton kaj mi aprecadas tralegi ĝin. Mi esperas ke via laboro bone iros kaj antaŭ ĉio, mi tre ege deziras ke Esperanto prosperu en la mondo.

Samideane via, **Kyotaro Deguchi**  
(EPA de Oomoto)

Vlora, 8-10-2000

Kara Christian, Mi dankas pro la sendo de la interesa revuo *Asistilo*. Kompreneble vi ŝatus ke mi abonu ĝin. Tion mi bedaŭrinde ne povas :

– kiel Bahaa volontulino mi memfinancas min kaj vivas kun magra budĝeto ;

– antaŭ ol reveni al Albanio en septembro, en Brindisi, oni ŝtelis mian mansakon kun ĉiuj dokumentoj, mono por unu tuta jaro kaj personaj aĵoj.

Do mi devas ankoraŭ pli ŝpari, kaj serĉi pli da studentoj por lingvaj kursoj. (Tiuj pri Esperanto estas senpagaj).

Tamen mi gratulas vin pro la naskiĝo de *Iniciato por Unuiĝinta Religiaro* kaj deziras grandan sukceson al ĝi kaj al vi. Kun koraj salutoj

(Heide) **Martha Otto**, Albanio

– Mi kondolencas vin pro via monperdego. Pri URI ne indas gratuli nin : Asisti alportis nur moralan kaj informan subteneton.

26-11-00 je 20 h 59.

Mia kara Lavarenne, mi deziras al vi kaj ĉiuj ASISTI-anoj feliĉan Kristnaskiĝon kaj bonan Novjaron por la jaro 2001. Mi esperas ke nia amikeco povos daŭri dum tuta la Novjaro kaj la sekvantaj.

**Leonardo Ramalho** (leoramalho@uol.com.br)

\*\* Mi esperas ke ankaŭ la angla versio, ĉar tiuj kiuj scipovas legi Esperanton ne plu bezonas ilin. (*La Red.*)

## Ni ricevis

**Ya-zu huo kai-xi Ya-zu ven-hua si-do : Jazu malfermas azian kulturan eron...**, de Ts. Bold, Ulaanbaatar, Ya-zu E-Akademio, 2000, 29 p.

**La Vivovojo de Jesuo-Kristo** : Deklar-historiaĵo nov-testamenta por privata kaj grupa studado, de János Csohány, trad. de Tibor Papp, Debrecena E-Societo, 1999, 29 p. (ISBN 963 300 744 5)

**Malgranda Ekumena Katekismo** [1998] : "ke ĉiuj estu unu", stato de ekumeno sojle de la 3-a jarmilo, de Heinz Schütte, trad. Adolf Burkhardt, Villingen : Bernhard Eichkorn nome de Ekumena Komisiono de IKUE kaj KELI, 1999<sup>2</sup>, 50 p.

**La Veraj Interparoladoj de Sokrato**, de Han Ryner [Henri Ner, 1861-1938], elfrancigis Lanti, Beauville : SAT-broŝurservo/Laŭte!, 1999<sup>2</sup>, 164 p.

**Dia Regno : Hist. de Kristana E-revuo**, de A. Burkhardt [1998 ?, 13 p.], el *Menade bal pŭki bal : Festlibro por Reinhard Haupenthal*, p. 63-75.

**Pli ol 50 tradukoj el diversaj lingvoj, plejparte kanteblaj**, kun ok por-okazaj rimajoj originalaj, de Adolf Burkhardt, Villingen : Bernhard Eichkorn, 1998, 60 p.

**Tero kaj ĉielo kantu** : Partoj I-X [kun] Suplemento, [tr.] de Adolf Burkhardt, Villingen : pastro Eichkorn, 1995-1998 (reviziita eld.), [36-52-76 p.]

**Akceptu unu la alian : Dek novaj kantoj** / Nehmet einander an : 10 neue lieder, tr. Adolf Burkhardt, München : Kirchentag, 1993, 16 p.

**Paco kun justeco** : Fina dokumento de la Eŭropa Ekumena Kunveno en Bazelo 15-21.05.1989, tr. de Adolf Burkhardt, Villingen : Bernhard Eichkorn, 1990, 37 p.

**Paradigmoŝanĝo en la sciencoj** : prelego pri papsikologio, homo kaj scienco, de D-ro Heinz C. Berendt, Jerusalem : Eld. Sivron, 1989, 21 p.

**"Iomete pri religio"** de A. Lopez Luna, en *Laŭte* (Beauville), n-ro 77 (6/7-1988), p. 29-31.

**"Impresoj pri sankta lando"** de Edgard Jamart, kaj **"Iom pri teologio"** de Valo, en *Laŭte* (Beauville), n-ro 75 (1/3-1988), p. 51-55.

**1887-1987, 100 Jahre Esperanto** : Das Abenteuer einer Sprache für den Frieden, de Otto Kar kaj Alois Schneider, Ternitz (A) : Esperanto-Servo im Bildungsverein Ternitz, [1987], 31 p.

**Beatrijs** [nederlanda Maria-legendo el la 13-a jc.], [trad. kaj] antaŭparolo de Gerrit Berveling, Vlaardingen : Voĉoj Kristanaj n-ro 10, 1986, 23 p.

**Eta Sabat-Dimanĉa Breviero**, de P-ro Willibald Kuhnigk OSB, Frat. Edith Biberstein OSB, trad. de Zamenhof, B. Eichkorn, E. Biberstein, antaŭpar. kaj eld. de Eichkorn, Meßkirch, 1985, 59 p.

**Konsiloj kaj demandoj : pri la ĉiutaga vivo laŭ la sperto de la Kvakeroj**, tr. A. Kinghorn kaj M. C. Butler, London : Kvakera E-Societo, 1984, 28 p.

**En la lumo de la Biblio**, kristanoj fronte al nuntempaj problemoj : paco, ekumenismo, roloj de virino, antaŭparolo de Adolf Burkhardt, Roma : Komuna eldono IKUE-KELI, 1982, 48 p.

**Al Diogneto** (pri nia religio), [eble de Kvadrato], el Προς Διογνητον tradukis Isai Sumber, Vlaardingen : Voĉoj Kristanaj n-ro 4, 1981, 24 p.

**Esperanta Meslibreto**, Romo : IKUE, 1978, 17 p.

**Francisko el Asizo : profeto por nia tempo**, de N.G.M. van Doornik, trad. E.N. Mulders, Romo : I.K.U.E.-Centro, 1973, 319 p.

**Sklavoj de Dio** : romano, de Géza Gárdonyi, el *Isten Rabjai* tradukis Johano Hamvai, Budapest : Hungara Esperanto-Asocio, 1972, 409 p.

**La du aspiroj de la homaro** : unu komuna internacia lingvo kaj unu scienca universala religio, de Nassif Isaac, d-ro pri psikol., d-ro pri metafiziko, Prof. pri parapsikol. ..., Aleksandrio, 1971, 57 p.

**Vojaĝimpresoj de egipto tra Eŭropo kaj Azio** per esperanto, de Nassif Isaac, Cairo, 1967, 64 p.

**La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof** : historia enketo pri la naskiĝo kaj la evoluo de la Zamenhofa Homaranismo, de C. Van Kleef, tr. C. Ribot, Marmande : Ed. Fr. d'Espér., 1965, 34 p.

**La tragedio de l' homo** : drama poemo, de Imre Madách, trad. de Kálmán Kalocsay, enkondu. de István Sótér, Budapest : Corvina, 1965, 259 p.

**Jen estas helpo por vi**, de "Kristano Venkanta" [Christian Victor, pseŭdonimo de usona pastro], el la angla trad. A. F. Doneis, [s.l.], 1965, 56 p.

**La surtera paco : encikliko**, de Johano XXIII, *cum Praefatio Latina*, [s.l.], IKUE, 1963, 61 p.

**Sintrompoj** [1866], de Johann Baptist Hirscher, trad. de Wilhelm Flammer, IKUE, 1963, 36 p.

**La esenco de la Kvakerismo**, de G. K. Hibbert, trad. M. Wajsblum, antaŭparolo de A. J. Leather, Ventnor : Kvakera Esperantista Soc., 1962, 37 p.

**Tio, kion mi kredas** (1953), de Jean Rostand, trad. de Pierre Berlot, Parizo : UFE, 1962, 39 p.

# Supplément français à ASISTILO n°26

(Hiver de l'an 113 de l'espéranto / 2000-2001)

Revue de religion comparée bilingue et organe de liaison d' « A.S.I.S.T.I. »

**Association internationale d'Etude des enseignements spirituels et théologiques**

Association **neutre**, associée à l'*Association Internationale pour la Liberté Religieuse (IARF)*, et membre institutionnel de la *Conférence Mondiale des Religions pour la Paix (WCRP)*.

Soutient l'*Initiative* pour une organisation *des Religions Unies (URI)*, fondée en juin 2000.

Collabore avec JBLE (Ligue bouddhiste japonaise espérantiste), OKEJ (Club orthodoxe des Juifs esp.),

TEL (Ligue oecuménique mondiale), UTSLE (Ligue espérantiste universelle d'étude du taoïsme),

EPA (Association espérantiste d'*Oomoto*), ŬEA (Association Espérantiste Won-bouddhiste, Corée),

UIEA (Association Espérantiste Islamique Universelle), UEA (Association Universelle d'Espéranto).

**Adresse en France** : Presbytère, 09800 Balagué. (Tél/Fax 05 61 04 70 66, CCP n°10 421 77 R Mars).  
chlavarenne@francemulimedia.fr (Contribution souhaitée ; envoi d'autres exemplaires sur demande).

## Un espérantiste cherokee condamné à mort aux USA

Le séquoia est un arbre immense, qui peut dépasser les 100 mètres de haut et vivre près de 3.000 ans. Ce nom est aussi celui d'un chef cherokee, See-Quayah (env. 1760-1843), inventeur de l'alphabet cherokee, qui fut tué par les blancs. Le mot *sekojo* est le seul d'origine cherokee en espéranto ; et c'est ce qui a décidé Nvwtohiyada Idehesdi à le choisir comme surnom. Comme l'arbre, puisse Sekojo vivre encore longtemps !\*

Sekojo est né le 3 janvier 1952 à Talequah (Oklahoma) sous le nom de Billy Waldon.

A la fin de ses études secondaires il s'engage dans la *Navy*. Il y reçoit une formation de technicien en électronique, et devient sous-officier responsable de la supervision électronique dans les opérations navales.

Pendant sa carrière navale il se fait l'avocat de l'espéranto. Il participe à des congrès et donne des conférences dans de nombreux pays sur le cherokee et sur le problème des droits des Indiens.



**Non à la peine de mort,  
pour qui ou quoi que ce soit !**

